

ESPERANTOLOGIO

INTERNACIA REVUO POR LA LINGVISTIKO KAJ BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTO

Vol. I (p. 1—80)

Aŭgusto 1949

N-ro 1

Redaktata de d-ro PAUL NEERGAARD, Ak., Kopenhago, Danlando.

Redakta komitato: Profesoro, d-ro BJÖRN COLLINDER, Uppsala, Svedujo • profesoro, d-ro W. E. COLLINSON, Liverpool, Britujo • docento, d-ro KALOMANO KALOCSAY, Ak., Budapeŝt, Hungarujo • profesoro NAOKAZU KAWASAKI, Ak., Osaka, Japanujo • profesoro S. LA COLLA, Ak., Milano, Italujo • d-ro WALTER LIPPMANN, Ak., New York, Usono • d-ro W. J. A. MANDERS, Venlo, Nederlando • profesoro, d-ro EDMOND PRIVAT, Ak., Neuchâtel, Svislando • profesoro, d-ro G. JOHN RAMSTEDT, Helsinko, Finnlando • magistro VILHO SETÄLÄ, Ak., Helsinko, Finnlando • profesoro G. WARINGHIEN, Ak., Tours, Francujo • d-ro-ing. EUGEN WÜSTER, Wieselburg, Aŭstrujo.



ENHAVO

PAUL NEERGAARD: Enkonduko	1
PAUL NEERGAARD: Introduction	3
VILHO SETÄLÄ: Lingva esprimkapablo kiel funkcio de la vort-trezoro	5
G. WARINGHIEN: La akuzativo en Esperanto, el teoria kaj interlingvistika vidpunkto	33
OLAV REIERSØL and R. C. MARBLE: A Comparison between Word Formation in Esperanto and English	53
J. RÉGULO PÉREZ: Hispanidaj neologismoj en Esperanto	59
PAUL NEERGAARD: Bibliografio de esperantologia literaturo 1940—1948	73
Notoj (Universitataj katedroj de Esperanto, k. a.)	77

EINAR MUNKSGAARD • PUBLISHER • COPENHAGEN • DENMARK

ESPERANTOLOGIO

Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto.

Adreso (abonoj, redakciaj aferoj) / Address (subscriptions, editorial matters):
D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago/Copenhagen K, Danujo/Denmark.

ESPERANTOLOGIO aperas per kajeroj 48—80-paĝaj formantaj volumojn 250—300-paĝajn. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj, unu volumo probable kovranta ĉ. tri jarojn. La abonpago por unu volumo estas 25 ŝilingoj anglaj aŭ 5 us. dolaroj aŭ 25 danaj kronoj.

La revuo estas destinita por la studo de Esperanto kaj akceptas traktaĵojn bazitajn sur originalaj esploroj el la kampo de la Esperanta lingvistiko inkludante i. a. fonetikon, leksikologion, etimologion, sintakson, stilistikon, lernopsikologion kaj bibliografion.

La respondeco pri asertoj, ĉu temas pri faktoj aŭ opinioj, restas tute ĉe ties aŭtoroj.

ESPERANTOLOGIO appears in issues of 48—80 pages, forming volumes of 250—300 pages. The issues will come out according to circumstances, one volume covering probably about 3 years. The subscription for one volume is 25 shillings, 5 dollars or 25 Danish crowns.

The journal is devoted to the study of Esperanto and accepts papers based on original research in the field of Esperanto linguistics including e. g. phonetics, lexicology, etymology, syntax, stylistics, psychology of learning and bibliography.

The responsibility for statements, whether of fact or opinion, rests entirely with the writers thereof.

INSTRUKCIOJ

por kunlaborantoj de

ESPERANTOLOGIO

- 1) *Manuskriptoj* proponataj por publikigo kaj komunikoj pri redakciaj aferoj estu sendataj al la redaktoro D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K, Danlando.
- 2) *Manuskriptoj* estu verkitaj en Esperanto, angla, franca aŭ germana kaj tajpitaj kun duobla interlinia spaco sur nur unu flanko de ne tro maldika papero, kun sufiĉe larĝa marĝeno ĉe la maldekstra flanko de la paĝo. Ili prefere estu sendataj duktzemplere por ŝpari tempon ĉe la prijuĝado. Kontribuaĵo enhavanta lingvajn aŭ formalaĵn erarojn povas esti resendata al la aŭtoro por korektado.
- 3) Traktaĵoj jam publikigitaj en unu el la supre menciitaj lingvoj aŭ aliloke prikonsiderataj ne povas esti akceptataj.

[daŭrigo sur p. 3 de la kovrilo]

INSTRUCTIONS

for Contributors to

ESPERANTOLOGIO

- 1) *Manuscripts* submitted for publication and communications concerning editorial matters should be sent to the editor, Dr. Paul Neergaard, Gothersgade 158, Copenhagen K, Denmark.
- 2) Manuscripts must be written in Esperanto, English, French or German and must be typed double space on one side only of a not too thin paper, with a fairly wide margin on the lefthand side of the page. It should be sent preferably in duplicate in order to save time in judging. A paper containing language or formal errors can be returned to the author for correction.
- 3) Papers already published in one of the above mentioned languages or under consideration elsewhere cannot be accepted.

[continued on p. 3 of the cover]

- 4) Ni rekomendas, ke traktaĵo estu dividata en sekciojn, ĉiu provizata per titolo. Klareco kaj koncizo estas esencaj.
- 5) Bibliografiajn referencojn indiku per la nomo de la aŭtoro sekvata per la jaro: (MOCH 1907) aŭ MOCH (1907). La bibliografion oni metu en la fino de la artikolo aranĝatan alfabete kaj kun ĉiu indiko redaktata jene:
MOCH, GASTON, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.
- 6) Ni presigas ĉiujn ekzemplojn pri vortformoj *kursive*, kaj tiajn ekzemplojn oni bonvolu substreki en la manuskripto (ne substreku ion alian). Se la aŭtoro deziras emfazi nemultajn gravajn vortojn aŭ frazojn koncizajn, oni substreku tiujn ĉi per rompita linio, kaj ili estos presataj interspacigite. Ĉiuj personaj nomoj estas presataj per malgrandaj ĉefliteroj: MOCH, kaj povas esti tajpataj tute per ĉefliteroj: MOCH.
- 7) Oni finu la artikolon per konciza kaj klara resumo redonanta la plej gravajn punktojn de la teksto.
- 8) La aŭtoro ricevas unu, se necese du presprovaĵojn de sia artikolo. Korektoelspezoj, kiuj superas 10 % de la kosto de la kompostado, devas esti pagataj de la aŭtoro.
- 9) La redaktoro bedaŭras ne povi honorarii artikolojn akceptitajn.
- 10) *Represaĵoj*. Ĉiu kontribuinto ricevas 2 ekzemplerojn de la kajero enhavanta lian artikolon. Senkostaĵaj represaĵoj ne estas je dispono. Tarifo estas ĉemetata al la presprovaĵo kaj la aŭtoroj povas mendi represaĵojn plenigante kaj resendante ordonan formularon.

- 4) It is recommended that papers be divided into sections, each headed by a caption. Clearness and conciseness are essential.
- 5) Text references should be made using author's name followed by the year: (MOCH 1907) or MOCH (1907). The bibliography should be placed at the end of the article and arranged in alphabetical order. Each item should be set out as follows:
MOCH, GASTON, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.
- 6) We print all examples of word-forms with *italics*, and such examples should be underlined in the manuscript (do not underline anything else). If the author wants to emphasize a few important words or short sentences these should be underlined with a broken line and will be printed with spaced type. All personal names are printed with small capitals: MOCH, and may be typed entirely with capitals: MOCH.
- 7) The article should conclude with a short, clear summary reviewing the important points in the text.
- 8) The author receives one, if necessary two proofs of his article. Correction costs which exceed 10 % of the type-setting costs must be paid by the author.
- 9) The editor regrets not to be able to pay any fee for articles submitted.
- 10) *Offprints*. Each contributor will receive 2 copies of the issue in which his article is published. No gratis offprints will be supplied. A printed schedule of prices is submitted with the proof and authors may secure offprints by placing an order on the blanks provided when proof is returned.

Enkonduko

En la lingvosciencia gazetliteraturo ĝis nun mankis periodaĵo, kiu speciale sin dediĉas al la scienca pritrakto de la lingvo Esperanto. La esperantologiaj studoj plej ofte aperis en formo de broŝuroj private eldonitaj aŭ kiel artikoloj en multnombraj gazetoj, grandparte nun malfacile haveblaj. Tio kompreneble malfaciligas, kelkfoje nebligas la uzadon de la ekzistanta literaturo.

Estas evidente, ke sana evoluo de la esperantologio havos decidan signifon por la progresado de Esperanto. Centra organo por esperantologiaj esploroj estos por tio valora helpo. La aperigo de scienca esperantologia revuo espereble stimulos la intereson por tiaj esploroj kaj ebligos plivastigon de utila kaj fruktodona kunlaboro kun neesperantistaj lingvistoj, terminologoj kaj aliaj sciencistoj.

La revuo ĉefparte aperigos traktaĵojn bazitajn sur originalaj esploroj en la kampo de la Esperanta lingvistiko, t. e. pri temoj de fonetiko, leksikologio (vortkunmeto, morfologio, vortenkonduko), etimologio, sintakso, stilistiko, evoluo, kompara lingvistiko (i. a. komparo kun aliaj planlingvoj), lernopsikologio kaj bibliografio. Inter altrudaj taskoj, kies efektivigon la planita periodaĵo favoros, estas la pretigo de fakaj Esperantoterminaroj kun definoj kaj tradukoj kaj de bibliografioj de faka literaturo en Esperanto, inkluzive gazetliteraturon (ekz. de botaniko, kemio, medicino, zoologio). Specialan atenton oni devas doni al problemoj de lingvonormigo, kies aktualeco en multaj fakoj de scienco kaj tekniko konstante akriĝas, kaj kiu tiel havas grandan praktikan signifon por vastaj neesperantistaj rondoj. Krom tiu ĉefa trunko de originalaj laboraĵoj, terminaroj kaj bibliografioj la gazeto devas enhavi: 1) referatojn kaj recenzojn pri publikigaĵoj, kiuj havas rilaton al la celo de la gazeto, 2) notojn (ekz. novaĵojn koncerne al lingvonormigo, Esperanto en universitatoj k. s.), 3) ĉiujn publikajn komunikojn de Akademio de Esperanto.

La originalaj laboraĵoj estos akceptataj en jenaj lingvoj: Esperanta, angla, franca aŭ germana, laŭ la deziro de la aŭtoro.

Supozeble la plejparto de la materialo estos redaktata en Esperanto, sed la publikigado de artikoloj ankaŭ en la eŭropaj ĉeflingvoj faciligos niajn klopodojn atingi atenton kaj kunlaboradon de vastaj rondoj neesperantistaj. La referatoj, recenzoj, notoj estos ĉefe redaktataj en Esperanto.

Necesas akcenti, ke la tasko de la revuo ne estas popularigi lingvistikajn temojn, nek instrui la lingvon. Ĝia tasko estas unuavice publikigi rezultojn de originalaj esploroj, duavice publikigi bibliografiojn kaj sinoptikajn artikolojn pri la atingajoj de la diversaj branĉoj de la esperantologio per tio faciligante la efektivigadon de originalesploroj. Principe ni ne devas enmeti lingvajn polemikaĵojn en la revuon — tiaj opiniinterŝanĝoj, kiuj povas esti utilaj, okazu prefere en la ĝenerala Esperanto-gazetaro.

Evoluigis en Esperanto relative ampleksa literaturo, faka kaj beletristika, kaj ni rajtas rigardi tiun ĉi lingvon kiel faktan lingvon, ne nur kiel teorian lingvoprojekton. La redakcio de la revuo agnoskas la nereformisman lingvopolitikon de la esperantistoj. Tion oni ne rigardu kiel esprimon de fanatika, religieca kredo, ke Esperanto estas ia nesuperebla ideallingvo. Sed ni opinias prava alpreni realisman rigardmanieron koncerne al la ebloj de tia planlingvo: necesas, por atingi praktikan solvon, sekurigi unuecon en la lingvosocio kreita surbaze de Esperanto, necesas sekurigi kontinuecon por ebligi naturan lingvan evoluon analogian al tiu okazanta en la etnikaj lingvoj. Aliflanke ni per tio ne deziras subtaksi la valoron de la teoriaj interlingvistikaj esploroj, kaj precipe oni ne devas kateni libebran, sobran kaj kritikan prijuĝon de Esperanto kaj vereman, objektivan komparon de nia lingvo kun aliaj lingvoj naciaj-etnikaj kaj internaciaj-artefaritaj.

PAUL NEERGAARD.

Introduction

A journal devoted to the scientific study of the language of Esperanto has been wanting among linguistic periodicals. About a hundred periodicals are being published in or on Esperanto, it is true, but they are either organs of various national organisations aiming at the furthering of Esperanto or they are journals devoted to various sides of the practical application of this language. Consequently, the literature dealing with the theoretical study of Esperanto has been published, for a great part, as pamphlets in private editions or as articles scattered in numerous journals. In many cases, unfortunately, these are small ephemeral journals now unavailable. We believe that a central organ for the research work being performed in this field will favour a sound evolution of Esperanto linguistics. And it is to be hoped that such a journal will contribute to increase the interest among linguists and philologists in the study of the dynamics evolving in this world-wide experiment of practising a constructed language.

The main part of this journal should include papers treating problems, *e. g.*, within phonetics, lexicology, etymology, syntax, stylistics, comparative linguistics (including artificial languages) and the psychology of learning. Furthermore, it should contain bibliographical information on Esperantological literature. Among projects that should be furthered are the elaboration of scientific and technical terminologies in Esperanto, including definitions and translations, and the elaboration of bibliographies of the literature published in Esperanto on various sciences (*e. g.*, botany, zoology, chemistry, medicine). Special attention should be given to the problems concerning standardizing of language, a discipline of increasing practical significance to many fields of science and technology. Finally, the journal will contain 1) reviews of Esperantological publications and 2) communications from the Academy of Esperanto. The manuscripts will be accepted in the following languages: Esperanto, English, French and German.

A rather extensive literature comprising about ten thousand volumes has developed in Esperanto during this century, and yet perhaps, Esperanto is to a great extent a spoken rather than a written language. We are justified in considering Esperanto as an actual "living" language, not merely as a theoretical project. The editors of this journal recognize the nonreforming language policy followed by the Esperantists. This point of view should not be regarded as expressing a fanatical religious faith in Esperanto as a language incapable of improvement. But, we are inclined to take a realistic point of view as far as the possibilities of such a planned language are concerned. In order to obtain a practical solution it is necessary, we believe, to consolidate the language community actually created on the basis of Esperanto, to secure the continuity of the language, prerequisite for a natural evolution analogous to that occurring in the ethnic languages. On the other hand, we do not want to underestimate the value of the theoretical interlinguistic research work now being performed and, especially, we would not restrain a free, sober and critical judgment of Esperanto and a strictly objective comparison of this language with other languages, whether a national ethnic or an international constructed language.

PAUL NEERGAARD.

Lingva esprimkapablo kiel funkcio de la vorttrezoro

de VILHO SETÄLÄ*)

La studado de lingvoj atingis sciencan nivelon en la 1870-aj jaroj per la verkoj de la »jungramatikistoj«, kiuj montris ĝeneralajn leĝojn super la lingva evoluo. Post tio la lingvistiko studadis en konstanta, trankvila fluo la kontaktojn inter diversaj lingvoj (aŭ la uzantoj de tiuj) kaj la ŝanĝigojn en la lingvuzo per la tn. etimologioj. Fakte tio signifis ĉefe kolektadon de historia kaj kompara materialo kaj ilia ordigo. La »leĝoj« mem estis nur konstato de tio, kiel kelkaj serioj de ŝanĝigo okazis, sed silentis pri la kaŭzoj de tiuj.

En la nuna momento ŝajnas, ke ni povas aŭguri novan periodon en la studado de lingvaj fenomenoj. Epokon, kiu signifos atingon de sama nivelo scienca, kiu estas atingita en la natursciencoj.

Jam en la lastaj jaroj de la pasinta jarcento aperis kelkaj *statistikaj studoj* pri la homa lingvo. La plej granda kvanto da laboro verŝajne estas prezentata de la vortaro de F. W. KÄE-DING (1897—98), kiu faras statistikon pri la frekvencoj de germanaj vortoj en tekstoj enhavantaj sume pli ol 10 milionojn da vortoj. La celo de tiu vortaro tamen estis helpi al la kompilado de plej bona stenografio. Aliaj statistikaj verkoj havis pedagogiajn celojn. Pure scienca celon — esploron de la lingvo kiel homa reago kontraŭ okazaĵoj en la ĉirkaŭaĵo — havis la verko de GEORGE KINGSLEY ZIPF, *The psycho-biology of language* (1936). Ĉi tiun verkon, al kiu mi aludos ofte en la sekvonta pritrakto, mi konsideras kiel vojmontrilon al tute novaj kampoj de esplorado. Verŝajne ĝi tute ne ricevis la merititan elion en la filologia mondo. Interalie mi konstatas, ke la verko mankas en la biblioteko de Universitato de Helsinko, kiu estus la plej proksima fonto por subskribinto. Tamen, en ĉi tiu okazo mi povas nur mallonge aludi al la ĉefaj principoj tie disvolvitaj.

*) Magistro de filozofio, Helsinko.

ZIPF akcentas antaŭ ĉio, ke la lingvaj esprimoj, same kiel ĉiuj niaj gestoj, estas formoj de homa konduto (angle behaviour). Li montras, ke la skribado donas al ni eblecojn pli facile studi de scienca bazo ĉi tiujn gestojn ol ekzemple la movojn de niaj manoj, kaj ke la plej natura vojo trovi vere scienca bazon estas donata de la statistiko, ĉe kio la senco de la lingvaj elementoj provizore estas metata flanken. Kaj li montras rimarkindajn rezultojn atingeblajn per la aplikado de tiu metodo. Ni vidas, kiel la longeco de la vortoj estas esence dependa de ilia frekvenco en la uzado kaj ni vidas, kiel ĉiuj lingvoj en sia fonetiko celas al certa ekvilibro¹). Ni ankaŭ trovas, ke la aŭtoro penas elfosi regulojn pri la relativa frekvenco de diversaj vortoj en la lingvo kaj fine malfermas vastajn perspektivojn por kompreni la rilatojn inter precizeco de esprimo, intenso de emocio, kristaleco de la konfiguracio kaj la frekvenco de tiu.

La celo de nia esploro

La celo de nia esploro estas trovi mezuron por kompari diversajn lingvojn, ne en la senco de la ĝisnuna kompara lingvistiko, sed por valorigi ilin kiel rimedojn por esprimi homajn pensojn kaj emociojn.

Tiu celo frapos eble la leganton, kiu jam antaŭe okupiĝis pri filologiaj problemoj. Li eble vidos en ĝi ion eksterordinaran kaj pro tio eble ion nescienca — ĉar laŭ nia scio neniam ĝis nun la lingvoscienco konsideris la diversan valoron de lingvo kiel

¹) Ni ne povas preterlasi aludi al tio, kiel la verkoj de ZAMENHOF kaj precipe liaj pritraktoj de eblaj reformoj en Esperanto atestas pri profunda intuicio en ĉi tiuj »estontaj fakoj« de la lingvoscienco. Tio estus temo por alia ampleksa esploro. Jen unu sola ekzemplo. Z. proponis forigon de la litero »h« per enkonduko de neologismoj — kaj tiun vojon sekvis ankaŭ la Akademio, kvankam oni emas tion forgesi. Nun la frekvenco de h estas minimuma: en la Fundamento de Esperanto ĝi aperas 6 fojojn en ĉ. 6000 vortoj kaj ĉ. 40 000 sonoj de ĝiaj tekstoj (0,15 ‰) kaj en la esp. literaturo kun ankoraŭ pli malalta frekvenco. Laŭ la esploroj de ZIPF (komp. p. 75) ni povas konstati, ke en la »naturaj« lingvoj la plej malaltfrekvencaj sonoj aperas multe pli ofte, nome pli ol 10 ‰ en hungara, rusa, nederlanda, bulgara, pli ol 4 ‰ en itala, greka, angla, franca, kaj escepte 1,5 ‰ en ĉeka kaj 0,7 ‰ en hispana. *Neniu* vivanta lingvo povas konservi sonon kun tiel malgranda frekvenco kiel h en E.

esprimilo. Tial ni volas tuj refuti la supozitan rimarkon pri nescienceco. Sendube la lingvo estas antaŭ ĉio rimedo por homa reago en la ĉiutagaj cirkonstancoj. En la batalo por la ekzisto ĝi estas armilo same potenca kiel sabroj, pafiloj, atombomboj — tion jam pravas la grandaj monsumoj, kiujn la ŝtatoj uzas por propagando en la tempoj de paco kaj precipe de milito. En ĉiuj aliaj branĉoj de homa agado evoluigis ampleksa scienco pri la taŭgeco kaj efikeco de la laboriloj, kaj sur ĝia fundamento vasta aktiveco por raciigo de la tekniko. Kial la armilo de la homa penso farus en tio escepton? Kial la studado de ĝia efikeco kaj adapteco por sia tasko estus apriorie nescienca? Kompreneble ĉio dependos nur de tio, ĉu ni povos trovi sciencajn metodojn por la esploro de la lingvo en la aludita senco.

La intereson al la montrita problemoj vekis ĉe mi unue la propaganda eldiro de lingvoinstruisto ARTHUR M. JENSEN (1946) en lia lernolibro de angla lingvo »English by the Nature Method« (finnlingva eldono 1946). JENSEN asertas tie, ke la materialo de lia kurso estas zorgeme elektita kaj konsistas el 2300 vortoj, kiuj laŭ farita kontrolo sufiĉas por la kompreno de 94 % el »ordinara« angla teksto. Tuj ekestas la demando: kiel estus en Esperanto ĉe similaj kondiĉoj?

Ni ja sentas kaj »scias«, ke ĉe Esperanto estas multe pli bona lingvoscio atingebla per sama kvanto da vortoj kiel en angla lingvo, sed kiom kaj kiamaniere? Ĉu ne ekzistus ekzakta metodo fari la komparon?

Antaŭ ol ni transiros al tiu studado, estas eble necese aludi al tio, ke la suprenomita cifero de A. M. JENSEN montriĝis blufio en pluraj sencoj. Unue mi ne kuraĝis opinii, ke la cifero mem estus erara. Sed ĝi sonas tiel impona, se oni pensas pri tio, kiel granda estas la angla literaturo. Kaj fakte, oni devas subtrahi la ciferon el 100: ĝi ja signifas, ke el ĉiu meze facila angla teksto 6 % restas nekomprenebla, se oni posedas la nomitan vorttrezoron. En ordinara romano estas eble 350 vortoj sur ĉiu paĝo, kaj la tuta amplekso de la verko povus esti ĉ. 300 paĝoj, sume 100 000 vortoj. Legante tiun romanon ni devus meznombro serĉi 21 vortojn por ĉiu paĝo kaj ĉ. 6000 vortojn por la tuta libro. Kaj tio ne estas malgranda peno, se ni ne forgesas, ke »vorto«

ĉi tie signifas ĉiujn same skribitajn homonimojn de la lingvo, kaj sekve la »serĉado« de iu vorto signifas la elekton de la okaze konvena senco de la vorto. Por doni ian imagon pri tiu laboro mi aludas nur al tio, ke en la duvoluma Oxforda vortaro de angla lingvo (vol. I, 1933, p. 805—807) la vorto »go« estas klarigita per ĉ. 290 glosoj. Sed eĉ la cifero (94 %) de JENSEN montriĝis malĝusta — ĝi devus esti »preskaŭ 90 %« — aŭ pli klare »iom pli ol 10 % da nekomprenata teksto«, kiel montris miaj postaj studoj. Estas juste noti ĉi tie, ke mi pli malfrue vidis en la angla-lingva antaŭparolo al la nomita verko de JENSEN (1946 a) (subskribita en Stockholm en majo 1946) la suprenomitan frazon kun la noto »between 90 and 95 % of any ordinary English text«, kio ja estas pli proksima al la fakta proporcio.

Mi do komencis fari statistikan studon pri Esperanto. Nur, kiam mi jam atingis la bazajn rezultojn, mi eksciis per la »Esperantologio« de NEERGAARD (1942) pri samspecaj laboroj de RUBLEV, DANNEIL kaj STANCLIFF, ĉiuj tamen kun alia celo ol mia esploro.

La statistika studo de lingva materialo povas havi gravajn celojn praktikajn. Per ĝi ni povas atingi valorajn indikojn 1) pri la dezirinda enhavo de la instruo de unuaj paŝoj en la lingvo, 2) pri la plena lingva materialo instruota per lernolibro aŭ ĉe kursoj, 3) pri la evoluo de la lingvo kaj pri ĝia kontrolo, 4) por la propagando de la internacia lingvo.

Sed tute sendepende de la nomitaj praktikaj celoj ni povas serĉi eblecojn kompari diversajn lingvojn por ilia relativa valorigo kiel rimedoj de la esprimo de homaj pensoj. Ĉi tiu tasko, kiun mi alprenis por mia esploro, naskiĝis nur dum la laboro mem, parte el la deziro trovi ekzaktajn ciferojn por pravigi la propagandon por Esperanto, parte el la studado de la interesaj materialoj, kiujn donis al mi la nomita verko de ZIPF (1936), kaj kiun mi ne konis komencante mian laboron.

La objekto de la esploro

La objekto de la esploro estas la *vorto* en la »fluo de la lingvo« parolata aŭ skribita (presita). En ordinara lingvo la »vorto« estas tamen tro nepreciza laŭ sia senco, kaj nepre estas necese

precizigi ĝin kaj dividi en kelkajn apartajn sencojn per enkonduko de novaj esprimoj. Ĉe ZIPF (1936, p. 39) la »vorto« signifas la kombinaĵon de sonoj tia, kia ĝi estas en la teksto — *child* (infano) estas unu vorto, *children* (infanoj) alia, *give* (doni) tria, *gives* (donas) kvara kaj *given* (donita) kvina. Ni konservu la sencon de *vorto* en ĉi tiu senco. La vortoj infano, infanon, infanoj, infanojn formas unu *paradigmon*, kaj ili ĉiuj reprezentas saman *gloson*, kies senco estas »juna homo«. Same la angla gloso »to give« estas reprezentata de la vortoj »give«, »gives«, »gave«, »given«, »giving«, kiuj apartenas al unu paradigmo; la senco de tiu gloso estas »doni«.

Kiel objekton de la statistiko oni povas same bone preni gloson kiel vorton. Decidiga estas nur tio, kiamaniere oni povas atingi vere kompareblan studon pri diversaj lingvoj.

Tiam ni ne devas forgesi, ke la ĝusta bazo por la valorigo estas la vidpunkto de la lernanto de la lingvo. Eĉ rilate al nia propra nacia lingvo ni fakte ĉiam estas lernantoj. Se ni studas verkon el fako, kiun ni antaŭe ne konas, parton de la studado ĉiam formas la ekkono de la specialaj terminoj kaj esprimoj necesaj en ĝi. La tuta vivo estas lernado ankaŭ kaj antaŭ ĉio en la kampo de esprimado de la pensoj. Sed ŝajnas al ni prave pretendi, ke la lernanto de fremda lingvo estas pli neŭtrala, se estas demando pri ĝia valorigo kiel homa instrumento. Ni povas do sendanĝere rigardi la lingvojn de la vidpunkto de lernanto.

Tiam ni ne devas forgesi, ke en ĉiu lingvo estas iom da sistemo. Se ni volas kompari anglan lingvon kaj germanan, la fakto ke la duenomita havas multe pli grandan morfologion ol la unua, kondukas al »maljusteco«, se ni statistikas simple vortojn. Aliparte, se ni povas senĝene statistiki en ĉi tiu senco la gloson '*leg*' de germana lingvo (= meti) kiel unuon, ĉar la paradigmo konsistas el regulaj formoj *legen*, *legte*, *gelegt*, tio tute ne koncernas la gloson '*sitz*' (*sidi*), kies homologaj »formoj« estas *sitzen*, *sass*, *gesessen*. Ni devas havi la rajton kaj eblecon elekti laŭcele la unuojn de la statistikado.

Kian ajn formon de la statistikado ni elektos, la unuoj — objektoj de la esploro — estos (pli-malpli) neŝanĝeblaj elementoj de la lingvo, kiuj ripete aperas en la fluo de la parolo. Tiujn ele-

mentojn mi nomos — el la vidpunkto de mia statistika studo — *klišoj*. La afero estas plej simpla ĉe Esperanto. Tie ĉiu lingva elemento senplue povas esti konsiderata kiel klišo, ĉu radikoj, ĉu gramatika finiĝo, ĉu deriva elemento. Ĉe la aliaj lingvoj estas necese precizigi ĉiam la deiran punkton, t. e. la elekton de la klišoj kiel unuoj.

La fundamenta operacio

La objekto de nia esploro estas la vortoj en la fluo de parolo. Por ĉiu observo do estas necesa ia elekto el la »fluoj de parolo«. Kiel tiajn ni elektas hazarde alineon el gazeto aŭ kelkajn paĝojn el romano, ktp., eble elektante la specimenon laŭ speciala celo de la unuopa paŝo ĉe la studo, eble hazarde, kun celo atingi ian mezvaloran sondaĵon. Tiun specimenon ni trastudas kun la supozo, ke iu certa vortprovizo estas konata al fiktitiva lernanto. Fakte, ni ne devas diri »vortprovizo« sed *provizo de klišoj*. Nun ni kalkulas 1) kiel multaj *vortoj* en la specimeno enhavas *klišojn nekonatajn* al nia fiktitiva lernanto, kaj sekve estas nekompreneblaj vortoj, 2) kiel multajn *vortojn* la teksto sume enhavas. La nekonataj vortoj formas la *deficiton* de kompreno en tiu specimeno, kaj ĝia centobla raporto al la sumo de la vortoj en la specimeno estas ĝia *procenta deficit*.

La materialon de niaj rezultoj formas ĉi tiuj deficitaj procentoj.

Ni klarigu la aferon per ekzemplo.

Estu supozata provizo de 550 klišoj el Esperanto. Ili konsistu el la gramatikaj kaj (oftaj) derivaj elementoj kaj el la plej oftaj radikoj. Per tiu provizo ni »mezuru« la komencon de la rakonto Karlo de EDMOND PRIVAT. Por tio ni substrekas en la teksto ĉiun nekonatan klišon (kaj ni finos ĉe la 100-a vorto):

La Familio. — Kiam *naskiĝis* Karlo, rozkolora kaj sana *bubeto*, liaj gepatroj estis ankoraŭ tre junaj. Ilia unua infano li estis. Lia *apero* en tiu ĉi mondo *kaŭzis* grandegan ĝojon tra la tuta familio. Filo, vera vivanta knabeto! La junaj gesinjoroj Davis estis tre *fieraj* pri Karlo, kaj *ĝuis internan kaj trankvilan plezuron*. — Sed la patro de sinjoro Davis estis tro ĝoja por esti

kvieta. Avo li estis nun; li *forgesis*, ke tio iom maljunigas, kaj li kontraŭe sentis en si infanan *gajecon*. *Dum* du tagoj post la *naskiĝo* de Karlo li ne povis labori en sia oficejo. Li kuradis . . .

En tiu specimeno de 100 vortoj ni trovas 13 kursivitajn kliŝojn, el kiuj unu, 'nask', aperas dufoje. *La deficito de tiu teksto do estas 13 %, rilate al la provizo de 550 kliŝoj*. Ni povas tion skribi

$$x_{550} = 13.$$

Supozu nun, ke tiu teksto estus tradukita al angla lingvo kaj ke simila kontrolo de la teksto montrus tiam, ke lernanto konanta 550 el la plej oftaj kliŝoj de la angla lingvo ne povus deĉifri 26 vortojn (la cifero estas nur probabla sur la fundamento de supraĵa taksado). Tiam la deficito

$$x_{550} = 26$$

povus jam per si mem esti konsiderata ia indikilo pri la esprim-povo de 550 kliŝoj anglaj, kompare kun simila provizo Esperanta.

Serio de kliŝaroj por la esploro de Esperanto

Por nun progresi unu paŝon pli ni devas procedi al formado de gradigita serio de kliŝaroj. Provizore ni limigos nin nur al Esperanto. Estas bone, se oni povas kunmeti tiujn kliŝarojn kun kontakto al realaj bezonoj de la lingvinstruo.

Por la plej limigita kliŝaro, la *baza*, estas necese elekti tion, kio estas absolute necesa por ĉia lingvaĵo. Ĝi do konsistas el la gramatikaj elementoj (11 finaĵoj kaj la distingiloj de participo *-nt-* kaj *-t-*, sume 13), el la plej oftaj afiksoj (37) kaj el diversaj partikloj kaj similaj, t. e. ĉio, kion ni povas karakterizi kiel helpaj elementoj (100). Al tiuj ni povas aldoni el la plej gravaj radikvortoj laŭ gusto 50-on aŭ pli, ĝis 200, por tiel atingi la unuan gradon de kliŝaro kun 200 aŭ maksimume 350 kliŝoj (neniel malhelpas, se ni preferas uzi ambaŭ kliŝarojn, speciale, se nin interesas la esprimoj fareblaj per la konfiguracioj de kiel eble plej malmultaj elementoj).

Por la sekvontaj kliŝaroj ni elektas aldone radikojn el la plej frekventaj ĝis nun ne prenitaj (kaj ĝustatempe ankaŭ la ankorau mankantajn plej maloftajn derivilojn). Tiel ni starigas gradigitan serion da kliŝaroj, kiuj enhavas, ni diru ekzemple 550, 1000, 2000 kaj 3300 kliŝojn. La duagrada kliŝaro enhavas la 350 kliŝojn de la baza + 200 novajn kliŝojn, la tria ĉi tiujn 550 + 450 novajn, ktp.

La elekto de la amplekso de ĉiu el la kliŝaroj estas ja laŭvola. Ju pli malgrandan aldonon da kliŝoj signifas ĉiu paŝo de unu kliŝaro al la proksima pli ampleksa, des pli detalan informon ni ricevos pri tio, kiel *la defcito dependas de la amplekso de konata kliŝaro*, t. e. kia funkcio de la posedata »vortrezoro« estas nia »manko de lingvoscio«. Sed, implicate, ĝuste tio montros, kia funkcio de la »vortrezoro« estas la esprimpovo de la lingvo — kompreneble, sub la kondiĉo, ke tia funkcio estos trovebla.

Se la amplekso de la kliŝaroj estas laŭvola, tia ne estas ilia enhavo. Por ke la rezulto prezentu veran bildon de la studata lingvo, estas necese, ke la kliŝoj estu elektataj en ordo de mal-kreskanta frekvenco. Ĉi tie estus okazo por pritrakti malfacilan problemon, kio estas la lingvo mem, sed ni flankenlasu tion kaj kontentiĝu konstati, ke bona statistiko pri la frekvenco de la kliŝoj en diversspecaj specimenoj de iu lingvo donas la eblecon elekti la kliŝarojn laŭcele. Sed aliparte, persono, kiu bone scias la lingvon, povas konstrui la kliŝarojn tute kontentige sen tre vasta statistiko.

Jen, kiel mi procedis por havi la kliŝarojn de Esperanto.

1. B a z a k l i ŝ a r o. Fonto: Zamenhofa Ekzercaro. Laŭ »Konkordanco« al ĝi de WACKRILL (1907) estas facile kalkuli la frekvencon de ĉiu kliŝo (lingva elemento: radiko, finaĵo, afikso, partiklo uzata sen finaĵo; ĉe tio mi konsideris ĝusta kalkuli ankaŭ la komencon de la korelativaj vortoj — k-, t-, ĉ-, nen- — kiel kliŝoj, ĉar la formado de kiu, tiu, ĉiu, neniu ktp. estas plene regula el la 'radikoidoj' iu, ia, io ktp.) inter la 5870 vortoj de la tekstoj en Ekzercaro. (Al la tekstoj mi ne kalkulis la partojn en la komenco kaj fino, kiuj prezentas nur unuopajn vortojn.) — Se ni elektas inter tiuj kliŝoj ĉiujn, kiuj aperas minimume 6-foje, kaj kies frekvenco sekve superas 0,1 %, ni havas 200 ele-

mentojn. Se ni metas la limon pli malalten, al trifoje = 0,05 %, ni ricevas 350 kliŝojn.

Nun estas facile kaj interese konstati, ke la suma frekvenco de la kliŝoj »super 0,1 %« estas 77,5 %, kaj tiu de la kliŝoj »super 0,05 %« 86,4 % en la tekstoj de la Ekzercaro mem. La deficito do estas 22,5 % respektive 13,6 %. Estas interese samtempe noti, ke por la laste nomita deficito la Ekzercaro uzas 500 kliŝojn — la tuta nombro da kliŝoj en la Ekzercaro estas nome preskaŭ precize 850.

Sed la lingvo de la Ekzercaro ne estas »Esperanto« en la vera senco de la vorto. Ĝi estas kompilita en speciala celo — instrua. Ni havas sufiĉan kaŭzon opinii, ke la Ekzercaro estas bona teksto por lernanto, sed tia ne povas enhavi la pli malfrekventajn vortojn, kiuj ankaŭ ludas rolon en la »vera« Esperanto — antaŭ ĉio ĝi ja ne povas doni ian imagon pri la frekvenco de la kliŝoj ekster la nomitaj 850. Ni do devas mezuri per ĉi tiuj formitaj kliŝaroj (amplekso 200 resp. 350) ian »fremdan tekston«. La procedo estas tiu jam montrita kiel »fundamenta operacio«. Se ni plenumas tion al la rakonto Karlo (PRIVAT) kaj al la tradukita romano Fanny de FERBER, la rezultoj estas:

Amplekso de kliŝaro	Deficito ĉe Karlo kaj Fanny (%)	
200	26	31
350	19	23

(La objektoj de la mezurado estis hazardaj provoj el la nomitaj verkoj, kun malgranda amplekso).

Antaŭ ol mi progresis al pli vastaj kliŝaroj mi submetis la nomitan kliŝaron de 350 al severa kritiko. Estas klare, ke kliŝoj kiel *akuzativ* kaj *prepozici*, kiuj aperas inter ĝi, estas nur »okaze oftaj« en la Ekzercaro, ĉar ĝia celo estas instruo de lingvo kaj gramatiko. Ili devas esti forstrekitaj el la definitiva baza kliŝaro. Ne havante je mia dispono sufiĉe vastan statistikon, mi devis ĉe tiu kritiko uzi nur la »komunan prudenton« kaj mian lingvoscion. Mi eble faris eraron ĉe iu detalo, sed dum la laboro evidentiĝis, ke tiaj eraroj ne havas esencan signifon al la esploro. La forigitaj kliŝoj estis anstataŭigataj per aliaj, evidente pli necesaj.

2. Uzebla kerno de lingvo. La kompilo de dua ŝtupo, kliŝaro 550, estis ligita al praktika tasko: provo kunmeti kliŝaron, kiu estus minimuma kerno de uzebla lingvo tamen sufiĉa por junula korespondado kaj interŝanĝado de diversaj objektoj, kiel poŝtmarkoj. Mi tralegis atente kelkajn mallongajn listojn de oftaj vortoj kaj la Filatelan terminaron (SCOTT 1945). Bazante min sur mia memoro kaj prudento mi elektas la plej bezonajn kliŝojn, evitante ĉian duoblaĵon — estas ja demando pri minimumo. El la vortoj de Ekzercaro estas nenecesaj ekz. 'forĝes', esprimebla per 'ne memor', 'divers' (malsam), kaj 'cigar' kaj 'leon' certe ne apartenas al la absolute oftaj. Post tio mi ordigas la (sur slipoj skribitajn) kliŝojn laŭsence. Aperas mankoj: inter la statistike oftaj estas ekz. 'unu' kaj 'du' sed jam ne 'ok' kaj 'naŭ'. La liston de la numeraloj, semajnaj tagoj kaj monatoj ni devas kompletigi. Tiel prilaborinte la materialon mi fine venas al ĉ. 500 radikvortoj (ekster la 50 elementoj de gramatiko). Ĉar estas ankaŭ demando pri reklamo, kiu ŝatas rondajn ciferojn, mi decidas limigi la radikvortojn al precize 500.

Sekvas kontrolo. Karlo (1000 vortoj) kaj Fanny (600 vortoj) mezuritaj per ĉi tiu kliŝaro donas la deficitajn respektivajn de 11,7 kaj 17,2 %. Post tio mi legas sufiĉan kvanton da alia literaturo, por forgesi la detalojn de la uzitaj provtekstoj. Post severa revizio de la kliŝaro mi decidas forstreki el la »kerna« kliŝaro 20 kliŝojn tro specialajn kaj anstataŭigi ilin per 20 pli gravaj. Prova nova kontrolo montras, ke el tiuj 20 novaj 8 aperas en la provteksto el Karlo (1000 vortoj) kaj 7 ĉe Fanny (600 vortoj). La deficitaj do malaltiĝis ĝis 10,9 kaj 16,0 %.

Post kelkaj provkontroloj la listo estas preta. La nomitaj procentaj deficitaj restas validaj. De la vidpunkto de eŭropanoj estas interese konstati ankoraŭ la fakton, ke la defcito enhavas kvanton da »internaciaj« kliŝoj, familiaraj al la plej multaj lernantoj de Esperanto. Se oni supozas la diveneblon de tiuj laŭsence, kaj forstrekas ilin el la defcito, ĝi estas nur 8,0 resp. 9,2 %.

3. Pli vastaj kliŝaroj. La sekvaj ŝtupoj estas atingataj per simila procedo. Ĉe tiu mi komparas listojn de la plej oftaj kliŝoj en aliaj lingvoj, ekz. JENSEN (1946). Ni facile kom-

prenas, ke la provkontroloj donas valorajn aludojn pri la kliŝoj necesaj en la sekvontaj ŝtupoj.

La praktiko montris, ke ni povas veni al kontentigaj rezultoj en la esplorado de Esperanto, se ni havas la kliŝarojn kun resp. 950, 1800 kaj 3300 kliŝoj. La unuenomita enhavas tion, kio devus esti instruata en elementa lernolibro de la lingvo, la dua pli-malpli sufiĉas por ĉiutaga lingvo kaj la tria prezentas pli-malpli plenan »komunan vortaron«, se ni kuraĝas jam nun antaŭanongi tiujn praktikajn rezultojn de la esploro. Tute klare tio estas videbla el la sekva tabelo de deficittoj.

Tabelo de deficittoj en Esperanto

sur bazo de hazardaj specimenoj el kontinua teksto de du esperantaj verkoj — Karlo de E. PRIVAT (facila rakonto por lernantoj) kaj Fanny de E. FERBER (ordinara romano).

Amplekso de kliŝaro	Deficito ĉe Karlo kaj Fanny (%)	
200	26	31
350	19	23
550	10,9	16,0
950	5,7	8,3
1800	0,9	1,6
3300	0,0	0,1

La metodo

La metodo, kiun mi uzas, estas nun klara. La unua ŝtupo estas la kompilado de la kliŝaroj, se eble per la helpo de statistikaj laboroj. Pri la plej gravaj lingvoj eŭropaj jam ekzistas la bezona statistika materialo, kvankam ne ĉiam en tia formo, ke ĝi senplue estu uzebila por nia celo. Ĉiukaze, sur la fundamento de tiu materialo estas eble kunmeti la kliŝarojn per ne tro granda peno. La dua ŝtupo estas la mezurado de hazardaj specimenoj de koncerna lingvo per la kompilitaj kliŝaroj. Tie ni havas la plej grandan ŝparon de laboro kaj energio kompare kun la malnovaj metodoj de simpla statistikado.

Por la praktika laboro ni bezonas alfabetan liston de ĉiuj koncernaj kliŝoj, kun klara signo pri la grado, al kiu ĉiu el ili apartenas. La »fundamenta operacio« estas efektivigata simple per

tralego de la hazardaj tekstprovoj. Rapide oni ellernas la kliŝojn apartenantajn al la baza listo. Pri tiuj estas nenia noto necesa. Pri la aliaj ni notas, en kiagrada listo ili unue aperas. Uzante konvenan tabelon, sur kiu ĉiu kliŝo, mankanta en la baza listo, estas notata kun la grada noto (streko en aparta kolono por ĉiu grado), ni havas facilan aranĝon por sumigo de la diversaj deficitaj. Estas nur ankoraŭ necese kalkuli la nombron de ĉiuj vortoj en la studitaj provtekstoj, por povi transiri el absolutaj deficitaj al procentaj.

Ĉi tiu laboro postulas nur partumon de tiu tempo, kiun oni bezonas por detala statistikado de la sama teksto. Ne estus giganta laboro tiel tralegi tutan romanon aŭ elektojn el diversaj romanoj kaj aliaj tekstoj kun grandaj kvantoj da vortoj, ni diru ĝis 100.000 vortoj, en kelkdek horoj, dum la statistikado de simila kvanto da teksto postulus tedan laboron de monatoj. Sed fakte, laŭsperte, per mia metodo oni ricevas tute sufiĉan gradon de akurateco, t. e. sufiĉe malgrandan ekarton per kontrolo de kelkaj paĝoj, hazarde elektitaj el diversaj partoj de la esplorata libro aŭ alia »fluo de parolo«.


Tiel oni povas, per apliko de la nova metodo, ricevi pli ekzaktan bildon pri la distribuiĝo de frekvencoj en certa lingvo per la laboro de kelkaj dekoj da horoj ol per mekanika statistikado de vasta materialo, postulanta plurajn monatojn, eĉ jarojn.

Por ne kulpigi pri troigo mi devas tamen rememorigi, ke la rapida apliko de mia metodo supozigas relative bonan konon de koncerna lingvo, kaj ĝi estas plej bone uzebla sur la bazo de jam ekzistantaj (ne tre vastaj) statistikoj pri la plej oftaj vortoj, per kies helpo la necesaj kliŝaroj estas kompileblaj.

La rezulto de la esploro de Esperanto

Provo ilustru la suprepresitan tabelon de deficitaj per grafikaĵo estis natura sekva paŝo. La aspekto de la kurbo sur ordinar ebena (egaldistancaj skaloj) memorigis pri esponanta funkcio kaj inspiris al provo de logaritma ebena²⁾. Kiel oni povas konstati el la aldonata figuro 1, la plej multaj punktoj tiam lokiĝas

²⁾ Ĉi tie dankon al doktoro NEERGAARD pro inspira atentigo!



Figuro 1. Statistika analizo de esperantaj tekstoj (F = FERBER, Fanny, romano, K = PRIVAT, Karlo, facila rakonto por komencantoj). La absciso x estas la procenta deficito de lingvoscio, la ordinato y la kvanto de konataj kliŝoj (= lernita vorttrezoro). Rimarku, ke la grafikaĵo en sia esenca parto estas rekta, kiam la skalo de x estas logaritma.

sur rekta linio. Fakte, ni povas konstati, ke komencante de la deficito 25—30 %-a en la direkto al pli malgrandaj deficitoj, *la deficito je la kono de Esperanto estas esponenta funkcio de la posedata kliŝaro*. Tio valoras kun ĉia postulebla precizeco same pri la elementa teksto de Karlo kiel pri la ordinara romana teksto de Fanny. Nur la ascendo de la koncerna grafikaĵo estas pli kruta ĉe la ordinara romana teksto ol ĉe la facila teksto por lernantoj.

La leganto, kiu konas la gravecon de la esponenta funkcio en multaj naturaj fenomenoj, komprenas, ke tiu rezulto ne estis akceptita sen pozitiva emocio. Sed antaŭ ĉio ĝi inspiris al studado de la analoga funkcio ĉe aliaj lingvoj.

Esploro de aliaj lingvoj

Kritiko de la teorioj de ZIPF. Intertempe mi ekkonis la verkon de ZIPF (1936). Unu parto de la verko estas dediĉita al la studo de vortofteco (p. 20—48). La metodo uzita estas diferenca de la mia (simpla statistikado kiel bazo de konkludoj) kaj limiĝas tute je la *interna* mezurado (se oni permesas al mi nomi *ekstera* mezurado mian metodon aplikitan al valorigo de fremda teksto per la kliŝaroj ricevitaĵ el certa konata teksto). La rezultoj ankaŭ estas malsimilaj al la miaj. Unue kelkajn vortojn pri ili.

ZIPF ĉerpas materialon el la verkoj de diversaj filologoj (ekz. pri angla lingvo el R. C. ELDRIDGE), tabeligas ilin kaj ilustras ilin per grafikaĵoj sur duoble logaritma ebena, kaj devenigas el ili du leĝojn pri frekvenco. Ĉe tio ZIPF pritraktas kvazaŭ individue ĉiun apartan vorton (kliŝon). Ĉi tio nepre rezultas al malfacilaĵoj. Ĉi eĉ estas neevitebla fonto de eraroj, ĉar en diversspecaj tekstoj la frekvenco de apartaj kliŝoj varias, fakto, kiu neniel ĝenas nin, se ni studas la fenomenojn dependajn de vortgrupoj — niaj kliŝaroj.

Ni diris, ke ZIPF prezentas du leĝojn pri la frekvenco. Por la unua li signas per a la nombron de tiuj kliŝoj, kiuj aperas en la statistikita teksto b fojojn, kaj sekve per b la respektivan nombron da aperoj en la teksto. Kaj nun li elmetas la leĝon, kiun laŭ lia pretendo plenumas la koncernaj kliŝoj, per ekvacio

$$ab^2 = k,$$

kie k estas *konstanto*, se oni esceptas pri kliŝoj de plej granda frekvenco (ZIPF, p. 41—42). En angla lingvo estas, laŭ ZIPF (p. 43) $k = 4200$ por la materialo de 44 000 vortoj. Por valorigi tiun aserton estas konvene tabeligi komencon de la statistiko de R. C. ELDRIDGE (ZIPF, p. 28) kun aldono de la valoroj de k , kiujn ZIPF ne entabeligas. La subskribinto kuraĝas esprimi sian miron pri la opinio de ZIPF, kiu asertas tiun k konstanto.

Rigardante tiun tabelon ni estas tentataj diri, ke la statistiko maksimume montras, ke la konstanteco de k estas nur proksimuma interpreto de la pritraktata fenomeno.

La dua leĝo de ZIPF eliras el la plej frekventa kliŝo. (ZIPF skribas »different words«, kion mi tradukas per »kliŝoj«, por ne

Amerika gazeta anglolingvo laŭ R. C. ELDRIDGE

Valoroj a kaj b el ZIPF (p. 28). Valoro $k = ab^2$ kalkulita de V. SĤTÄLÄ (per logaritma kalkulilo). La statistiko de ELDRIDGE koncernas gazetan tekston de ĉ. 44 000 vortoj kaj 6000 kliŝoj.

b	a	k	b	a	k	b	a	k
1	2976	2976	11	40	4840	21	13	5720
2	1079	4320	12	37	5330	22	11	5310
3	516	4650	13	25	4220	23	6	3180
4	294	4700	14	28	5490	24	8	4610
5	212	5300	15	26	5850	25	6	3750
6	151	5430	16	17	4350	26	10	6760
7	105	5150	17	18	5200	27	9	6550
8	84	5380	18	10	3230	28	6	4690
9	86	6950	19	15	5400	29	5	4200
10	45	4500	20	16	6400	30	4	3600

kaŭzi malklarecon per la multsignifa »vorto«). Li enkondukas la koncepton »ondlongeco« de kliŝo, per kiu li signas la inversan valoron de frekvenco, kaj tabeligas laŭ la statistiko de ELDRIDGE, ĉi tiun fojon donante la faktajn ciferojn, jene:

Ordo de kliŝo komencante de la plej frekventa	Ondlongeco	
	teoria	fakta
1	10	10,2
2	20	20,4
3	30	32,1
10	100	91
20	200	163
40	400	382,6
100	1000	1047,6
195	1950	2000
500	5000	4888,88
920	9200	8800
1950	19500	22000
3000	30000	43989

kaj la leĝon li esprimas: la n -a kliŝo havas la ondlongecon de $10n$. Mem li koncedas, ke estas iom da arbitro en la tabelo; ekz.

la kliŝoj 920-a ĝis 1130-a ĉiuj havas saman frekvencon (kaj saman ondlongon) faktan (nome frekvencon 5 kaj ondlongon 8800), dum la teoria ondlongo varias inter 9200 kaj 11300. Ankaŭ ĉi tie estas demando nur de teorio, alproksimiĝanta al la faktaj observoj. Sed tiu alproksimiĝo ne pliboniĝas, se oni plivastigas la statistikon, ĉar ĉiam estos grupoj da kliŝoj kun sama frekvenco inter si, dum la teorio postulas por ĉiu kliŝo sian propran frekvencon.

ZIPF eĉ ne aludas al tio, *kiel* la du leĝoj — pri sama fenomeno — *akordiĝas*. Kiel dirite, la ondlongeca teorio postulas al ĉiu kliŝo sian propran ondlongon, dum la teorio pri la konstanta produkto $ab^2 = k$ supozigas a kliŝojn kun komuna frekvenco (b aperoj ĉe teksto de N vortoj). Aliparte, se ni konstruas liston de ideala vortamaso laŭ la formulo »ondlongo de n -a kliŝo $= 10n$ «, kun supozo de $N = 44\,000 =$ la nombro de ĉiuj vortoj (kun ripetadoj), estas neniam malfacilo kalkuli la aperojn $b = 44\,000 : 10n$ kaj rondigi la valorojn de b al entjeroj — ĉar nur entjero ja havas sencon kiel »nombro de aperoj« — ĝis la 73-a kliŝo, kiu aperas $60,3 \sim 60$ foje. Sed nun sekvas:

n	b	a	ab^2
74	59,4 $\sim$ 59	2	7000
75	58,7 $\sim$ 59		
76	57,8 $\sim$ 58	1	3400
77	57,1 $\sim$ 57	1	3300
78	56,4 $\sim$ 56	2	6300
79	55,7 $\sim$ 56		

La vortoj kun sama nombro da aperoj (= sama frekvenco) naskiĝas nur per la rondigo al entjeroj, de la punkto, kiam la diferenco inter la sinsekvaj apernombroj malsuperas la unuon. Nature, ili ne povas aperi en tia serio, ke ili plenumus la postulon $ab^2 = k$.

Se ni kontraŭe volas konstrui idealan vortamason laŭ la regulo $k = 4200 = ab^2$, kun sinsekvaj entjeroj 1. 2. 3. . . kiel valoroj de b , ni baldaŭ venas al frakciaj valoroj de $a =$ nombro de kliŝoj, kaj kiam la valoro de a falas sub la unuo, estus necese al-

menaŭ esplori, kiamaniere oni interpretu la leĝon for de tiu limo, aŭ ĉu oni simple konjektu, ke la leĝo ne plu valoras de tiu punkto.

Oni demandas ankaŭ, kiamaniere k dependas de la tuta vortnombro N . Sen informo pri tio estas malfacile apliki la teorion. Tio do ankaŭ postulus esploron, kaj certe tio ne estis neebla, almenaŭ rilate al partoj de la ekzistanta statistiko.

Per tiu kritiko mi neniel volas senvalorigi la verkon de ZIPF, en kiu ĉi tiuj teorioj ne ludas centran rolon.


Apliko de la nova metodo

Angla lingvo. La senpera apliko de la nova metodo al la informoj pri angla lingvo en ZIPF (p. 28) ne estas ebla, ĉar tie estas nur tabelo de ciferoj, kaj ne la listo de la kliŝoj mem. Tamen, laŭ la tabelo ni povas formi al ni imagon tute precizan pri la sinsekvaj kliŝaroj formeblaj el la esplorita vortamaso, kaj pri la respektivaj deficitoj. Kiam ni ekz. legas el la tabelo, ke en la vortamaso de 44 000 vortoj estis 2976 kliŝoj aperantaj nur unu fojon, ni povas konjekti, ke se nur tiuj kliŝoj estas nekonataj al la lernanto, lia deficito estas $2976/44\,000 = 6,77\%$. Tiel ni povas facile trastudi la tutan vortamason, mezurante ĝin per si mem, *interne*, kiel ni esprimis nin pli frue. *Ekstera* mezuro ne estas ebla, pro manko de la vortlisto mem.

Se ni nun ilustras la rezulton de tiu esploro per grafiko, ni konstatas, ke *ankaŭ ĉe la angla lingvo prezentiĝas esponenta funkcio*. Ĝi validas inter la valoroj de la deficito de 25 ĝis 3 %.

Jam en la studo pri Esperanto ni konstatis, ke la funkcio validas nur por deficitoj sub certa komenca valoro. Tiel ankaŭ ĉi tie. Sed kion signifas la diferenco inter la faktaj kaj teoriaj valoroj ĉe la plej malfrekventaj kliŝoj, ĉe deficito sub 3 %?


Ĉi tie ekaperas simple la nesufiĉeco de la *interna* mezurado. La amplekso de la materialo de ELDRIDGE, kiu servas al ni kiel bazo, estis ĉ. 44 000 vortoj da teksto. 3 % de tio estas 1320. Sed la nombro de la vortoj, kiuj aperas nur unu fojon en la teksto, estas 2976. Sekve, ĉiuj kliŝoj aperantaj en la deficito 3 %-a apartenas al la kliŝoj unuopaj. Supozu nun, ke la materialo estus ekz. kvinobla, 220 000 vortoj. Se ni farus la saman mezuradon kun



Figuro 2. Statistika analizo de angla (A) gazeta teksto el Chicago (laŭ ELDRIDGE) kaj latina (L) teksto de PLAUTUS. Por komparo, la grafikaĵo pri esperanta (E) teksto en sama skalo. Koordinatoj kiel en fig. 1. Pri la kurba supra parto de la grafikaĵoj konsultu la tekston.

sama rezulto 3 %, certe inter la kliŝoj de tiu defecito aperus, krom tiaj, kies absoluta frekvenco estus 5 okazoj, ankaŭ tiaj kun abs. frekvenco 4, 3, 2 kaj 1 okazoj (en 220 000). Ĉar neniu kliŝo tamen povas havi abs. frekvencon frakcian, el kvin kliŝoj kun suma frekvenco 5/220 000 aperos en la vortamaso de 44 000

probable unu fojon *unu*, anstataŭ la kvin kliŝoj, kiuj devus aperi po 0,2 foje. Sekve, la unuopaj kliŝoj en malvasta statistiko reprezentas grupojn da kliŝoj en pli ampleksa simila statistiko.



Figuro 3. Statistika analizo de Peipinga dialekto, *Pv* sur la bazo de kompletaj vortoj, *Ps* sur la bazo de silaboj = vortelementoj. Koncerna ordinato maldekstre $y(P)$. *Ep* grafikaĵo pri Esperanto en sama skalo. — Analizo de franca lingvo (*Fr*). Ĉe manko de informoj pri la nombro de plej frekventaj kliŝoj la ordinato (dekstre) $-y(Fr)$ montras la nombron de la nekonataj kliŝoj por ĉiu procenta defcito x . *Ef* donas por komparo la analizon de Esperanto en sama skalo de ascendo.

La falanta kurba finiĝo de la grafiko do estas sekvo de nesufiĉa amplekso de la statistiko.

Ĉi tiu manko ne aperas ĉe la uzo de la *ekstera* mezurado, kies preferindeco do estas per ĉi tio pruvita.

Kiel definitivan rezulton ni do povas kun granda verŝajneco de ĝusto pretendi, ke ankaŭ *en angla lingvo la deficiĉto estas esponenta funkcio de la amplekso de kliŝaro*, kiun la lernanto posedas.

Aliaj lingvoj. ZIPF donas diversfontajn statistikojn de aliaj lingvoj: franca, latina (de PLAUTUS) kaj ĉina dialekto de Peiping. Ĉiujn nomitajn statistikojn mi esploris laŭ simila maniero, kun la rezulto, ke ili ĉiuj sekvas la esponentan leĝon tiel precize, kiel oni povas atendi de ia statistika esploro, kie ja ĉiam la hazardo ludas gravan rolon. Tio estas des pli interesa, ĉar la bazo de la statistiko ĉe la diversaj lingvoj estis malsama: en franca lingvo la kliŝo signifas glosan (sencon), kaj en tiu statistiko oni ne atentis pri la malregulaj formoj, ĉe kiuj la koncepto »kliŝo« ne estas strikte aplikebla; en la dialekto de Peiping estas uzitaj du bazoj — se la kliŝo estas = vortelemento, la valideco de la esponenta leĝo estas evidenta, sed ĉe uzo de la bazo kliŝo = vorto, la malvasteco de la statistiko ne permesas klaran supervidon; la latina statistiko verŝajne estas farita simile kiel la angla, sur bazo de vortoj.

Fine mi studis la gigantan statistikon de KAEDING (1897—98) pri la germana lingvo. Per longedaŭra laboro (komputado de la nombroj de kliŝoj kun frekvenco en sama intervalo) mi povis aranĝi la statistikon aplikebla por la ekstera mezurado de germanaj tekstoj, sur la bazo »kliŝo = vorto«. La rezulto tute kontentige akordiĝas kun la esponenta leĝo. (Simila studo sur bazo »kliŝo = vortelemento senŝanĝa« ĝis hodiaŭ ne pretiĝis, sed sekvos poste).

Ĉiuj nomitaj rezultoj estas ilustrataj per grafikaĵoj. Ili klare montras, ke la *geometria reprezentanto de la serĉata funkcio ĉe ĉiuj ĝis nun esploritaj lingvoj estas rekta en la duone logaritma ebena*, inter la limoj jam aluditaj en ĉi tiu esploro.

Analitika formo de la funkcio

Atinginte ĉi tiujn rezultojn ni transiros al la analitika esprimo de ili.

Ĉar ni scias, ke la deficino estas esponenta funkcio de la amplekso de respektiva kliŝaro, estas plej simple logaritmi la formulon de la funkcio, en kiu okazo ni havos

$$\log x = F(y)$$

se x signifas la deficon, respektivan al kliŝnombro y . Sed ĉar la funkcio estas lineara sur la logaritma ebena, $F(y)$ estas lineara esprimo:

$$\log x = ay + c.$$


Restas la trovo de plej adaptaj konstantoj.

Nun ni rememoru pri la definitiva celo de nia esploro, trovi rimedojn por kompari la esprimopovon de diversaj lingvoj, kiel funkcion de la »vortprovizo« (konata kvanto da kliŝoj). Pro praktikaj kaŭzoj ni tial elektos kiel unu konstanton en la funkcio la *kliŝnombron respektivan al 10 %-a deficino*. Ĉi tiun konstanton ni signas per B .

Pensante pri aliaj fenomenoj, kiuj sekvas la esponentan funkcion, ni memoras, ke ĉe la disatomiĝo de radiaktivaj korpoj oni uzas kiel karakterizan konstanton la tempodaŭron, en kiu la duono de la origina korpo disatomiĝas. Ankaŭ ĉi tie ni facile trovas *duonigan konstanton* — la nombron da kliŝoj, kiun oni devas aldoni al la jam posedata kliŝaro, por ke la deficino duoniĝu. Ĉe sama funkcio esponenta, tiu nombro estas konstanta. Ni signu ĝin per D . La ĝenerala funkcio por ĉiu lingvo tiam havas la formon

$$\log x = \frac{B-y}{D} \log 2 + 1.$$

Sur la fundamento de miaj ĝisnunaj studoj ni povas doni la valoron de tiuj konstantoj por ses lingvoj. Ĉe tio oni povus procedi analitike (kalkulado ebeniga baze de la plej malgrandaj kvadratoj). Tamen, laŭ la senco de ĉi tia statistika kalkulo, ŝajnas al mi plej racie kontentiĝi je la valoroj riceveblaj el la grafikaĵo desegnita laŭ vida taksado (per tio, ke oni tiras la rektan kiel eble plejadapte al la punktoj difinitaj per statistika kalkulo). Mi tabeligas la valorojn jene:



Figuro 4. Analizo de germana lingvo (G). Por komparo, la grafi-
koj de angla (A) kaj esperanta (E) teksto en sama skalo. — Dek-
stre geometria difino de la konstantoj kaj formiĝo de la funkcio el
du similaj ortangulaj trianguloj, el kiuj la konstanta havas la bazon
 $\log 2$ kaj la ortanton D ; la varia havas konstantan verticon ĉe
 $x = 10$, $\log x = 1$, $y = B$ kaj la varian verticon $\log x, y$ sur la gra-
fikaĵo, sekve bazon $1 - \log x$ kaj ortanton $y - B$. El la simileco de
la trianguloj sekvas

$$(1 - \log x) : \log 2 = (y - B) : D.$$

Lingvo	B = kliŝnombro por defcito 10 %	D = aldona kliŝkvanto duoniga je defcito
Esperanto (Fanny) .	790	375
Esperanto (Karlo) ..	600	330
Angla (Ĉikaga gazeto)	2350	1400
Latina (Plautus) ...	5300	2500
Franca (HENMON 1924) ³⁾	?	1400
Germana (KAEDING) .	8600	6700
Peiping (ZIPF, p. 257)	600	300

Konkludo

Per nia esploro ni atingis unue *novan metodon* de statistika studo de la vortfrekvenco, kiu donas eblecon atingi rezultojn per multe pli granda rapideco ol la antaŭaj metodoj.

Aplikante la novan metodon al pluraj lingvoj kaj al tre diversaj materialoj ni trovis *ĝeneralan leĝon*, laŭ kiu la defcito de lingvoscio estas *esponanta funkcio de la amplekso de posedata kliŝaro* (vortprovizo).

Ĉi tiun rezulton mi konsideras la plej grava. La esponanta funkcio ludas fundamentan rolon en multaj naturaj fenomenoj. Plej populare dirite, ni povas montri konstantan duonigan faktoron, kiu estas karakteriza en la diversaj fenomenoj de radiaktiveco, de lumabsorbo en one penetrebla medio, de displantigo de varmo (kaloro) ktp. Eĉ la psikologia leĝo konata sub la nomo de Weber-Fechner estas ekzemplo de sama leĝo esponanta. Kvankam mi ne sentas min kompetenta en la nuna momento aŭguri pri la konsekvencoj de ĉi tiu eltrovo, ŝajnas al mi, ke per ĉi tiu paralelismo aperas novaj perspektivoj al la statistika studo de homa lingvo kiel esprimilo de nia psiko.

Nia funkcio havas du karakterizajn konstantojn. Ĉe la esploro de unu sama lingvo ni povas konstati, ke la valoroj de tiuj konstantoj (konstantaj nur por simila lingva materialo) respegulas la riĉecon de esprimoj en la koncerna teksto. Ĉe »facila« teksto, ambaŭ konstantoj — la kliŝkvanto bezona por (ne pli ol) 10 %-a defcito kaj la kliŝkvanto duoniganta la defciton — estas pli

³⁾ Pro nekompleteco de la franca statistiko, B nekalkulebla.

malgrandaj ol ĉe malfacila teksto. Aliparte, se ni eliros el egalvaloraj specimenoj de diverslingva teksto, la rezultantaj konstantoj estos adekvataj por ĉiuj lingvoj, kaj en tiu okazo la malgrandeco de la konstantoj estas pruvo pri 1) facila lerneblo de la lingvo kaj 2) pli granda esprimpovo de la lingvo, ĉe supozo de same granda kliŝnombro posedata.

La atingo de tiuj definitivaj rezultoj postulas ankoraŭ multan laboron. Antaŭ ĉio, por tio devas esti formataj adekvataj kliŝaroj por la komparotaj lingvoj. Ĉe tio estas antaŭ ĉio necese starigi klarajn regulojn pri tio, kio en ĉiu lingvo devas esti konsiderata kiel unuo de la statistikado (kliŝo). Ni jam aludis al tio, ke ekz. en germana lingvo la membroj de la paradigmo »sitzen« devas esti prezentataj de pluraj kliŝoj — *sitz, sass, sess* (gesessen), dum la paradigmo »legen« povas esti prezentata de unu sola kliŝo *leg*, kun supozo de la »sistemaj kliŝoj« *en, te, ge...t*, per kiuj oni simple kunmetas *leg/en, leg/te, ge/leg/t*. Ĉar la celo de la lingvo estas antaŭ ĉio servi kiel rimedo de interkompreno, ĉe tio ni rajtas procedi sendepende de historiaj kaj etimologiaj faktoj, bazante nin nur al evidenta analogio kaj sekva »logika« derivebleco.

Aliparte estas necese — por ricevi firman bazon de komparo — atenti pri la diversaj sencoj de sama vortformo — homonimoj — kiuj devas esti kalkulataj kiel apartaj kliŝoj. Al tio ni ne havis eblecojn en la antaŭa studo. Fine restas faktoj nefacile esprimeblaj per ciferoj — ekzemple ne estas la sola malfacilaĵo pro la homonimoj la fakto, ke ili estas kalkulotaj kiel apartaj kliŝoj, sed jam la fakto, ke du aŭ pluraj konceptoj havas komunan nomon, estas embarasiga per maniero nemezurebla cifere.

Malgraŭ ĉiuj nomitaj malfacilaĵoj, ni vidas jam el la rezultoj de ĉi tiu studo, ke la nomitaj konstantoj donas al ni ideon pri la relativa malfacileco kaj esprimpovo de diversaj lingvoj. Ni volas atentigi nur pri unu detalo. Studinte diversajn lernolibrojn de »modernaj« lingvoj ni povas konstati, ke la celo de lerneja instruo de iu lingvo ĝenerale estas tia lingvoscio, kiun karakterizas la defecito 10 %. En angla lingvo por tio estas bezona la kliŝaro de ĉ. 2300 kliŝoj. Per same granda kliŝaro oni atingas en

Esperanto la deficiton de 0,7 %, kio jam signifas lingvoscion kaj ne nur elementan scion de la lingvosistemo.

Eble estus interese aludi ankaŭ al tio, ke la nomitaj konstantoj por ĉina lingvo (Peipinga dialekto) estas ankoraŭ pli malgrandaj ol por Esperanto. Tio verŝajne ne povas signifi pli malvastan enhavon de la koncerna lingvo. Eble ĝi respegulas la fakton, ke la ĉina lingvo jam dum multaj jarcentoj havis la okazon adaptiĝi al la esprimado de haltinta kulturformo, dum la eŭropaj lingvoj ĝuste en niaj tempoj neniam ricevis ripozan momenton por elspiri meze de la senhalta ŝanĝiĝado de la vivformo.

De la vidpunkto esperantista ankoraŭ kelkajn vortojn.

Antaŭ kelka tempo mi ricevis prospekton de »nova internacia lingvo« el Germanio. La prospekto enhavis tre malgrandan specimenon de teksto, nur kelkcent vortojn. Estis tamen facile fari supraĵan studon de tiu specimeno baze de la kliŝaroj pretigitaj por Esperanto. La studo montris klare, ke la »nova« lingvo estas de la sama tipo kiel la angla, ke ĝi prezentas ĉiujn samajn malfacilaĵojn per vortprovizo kiel la angla lingvo, kompreneble ne donante kompanse ion el la pozitivaj kulturvaloraĵoj, kiuj estas riceveblaj en la formo de la angla literaturo. Ĝi estis nova pruvo pri tio, kiel fundamente la diversaj lingvofaristoj miskomprenas la taskon kiun ili ekkaptas.

Sendepende de tio, ke la ĝis nun atinginta komparo inter la esprimpovo de Esperanto kaj tiu de aliaj lingvoj estas nekompleta, ni jam nun povas konjekti, ke persono edukita de sia juneco per Esperanto evidente bezonas nur frakcion de tiu tempo, kiun aliaj junuloj, por atingi la kapablon esprimi la ordinariajn formojn de homa penso kaj emocio. La tiel ŝparita energio de la homa menso estos libera al alia cerba laboro, kaj ĉar ni tamen kapablas regi kaj uzi ĉiujn asociaciojn, kiujn ordinara homa lingvo postulas por sia utiligo kiel rimedo de esprimado, ni povas diveni gravan kaj fortan antaŭenpuŝon de la homa kulturo per la ĝenerala enkonduko de raciigita planlingvo, kia Esperanto.

Mi esperas, ke la novaj kampoj de esplorado, kiuj malfermiĝas per ĉi tiu antaŭlaboro, invitos multajn talentajn kaj diligentajn lingvistojn al vastaj studoj, kaj ke tiuj plene pravigos min ankaŭ en ĉi tiu antaŭdiro.

Summary

The expressiveness of a language as a function of the thesaurus.

The purpose of this research is to find ways of comparing the different languages, in order to range them as means for the expression of human thoughts and emotions. The author turns his attention to the frequency of words. The nomenclature is the following: *vorto* (word, as composed of certain sounds or letters without regard to its meaning, e. g. child, children, give, gives, gave and given are six different words), *paradigmo* (paradigm, the system of words with same meaning, e. g. child, children belong to one paradigm, give, gives, gave, given to another) and *gloso* (gloss, the idea or meaning, represented by the words belonging to one paradigm). As a subject for statistics we can choose the words as well as the gloss. What matters is a method which leads to commensurable investigations of different languages. Indeed, as the words in the stream of speech must be comprehensible to the student, who knows the statistical units, these must be invariable parts of speech, and they are called "*klišoj*" (clichés) in this research. So the German root '*leg*' can be taken as a cliché, and the words *leg/en*, *leg/te*, *ge/leg/t* as combinations of the root with the "systematic" clichés *en*, *te* and *ge...t*. On the contrary, *sitzen*, *sass* and *gesessen* are all to be taken as different clichés. As all the words in Esperanto are only combinations of invariable elements, the study of the international language is the most simple case to begin with.

The author develops a new method of the statistical research. On the basis of statistical lists or knowledge of the languages, a series of sets of clichés of different grades is formed. The first set contains the most frequent clichés in the stream of speech. The second set contains as addition to the first set a quantity of the second most frequent words, not belonging to the first set, and so on. As a result we have a graduated series of sets, with an increasing number of clichés, e. g. I set 200 clichés, II set 350, III set 550, IV set 950, V set 1800 and VI set 3300 clichés. Now we take some samples of common text at random and note on a special list all the words which contain clichés not listed in a certain set. This special list is the *deficit* in the studied text on the basis of that set. For example, a text of one thousand (1000) words had one hundred and seventeen (117) words containing clichés not belonging to the third set (of 550 clichés). The deficit in that case is 117 of 1000 or 11,7 per cent. Thus we obtain a series of relative deficits (per cent) belonging to different sets of clichés (thesauri of different magnitude) and concerning a certain language (on the basis of a common text). See table on page 15. The graphical representation of this table on a semiloga-

rithmical plane proves to be a straight line (fig. 1), that is, *the deficit is an exponential function of the magnitude of the set of known clichés*. This rule is proved first with Esperanto, then with other languages (figs. 2—4). The general form of the function is

$$\log x = \frac{B-y}{D} \log 2 + 1$$

In this equation, x is the (variable) deficit per cent, y the (variable) magnitude of the set of known clichés, B the magnitude of the set, which corresponds to the deficit $x = 10\%$ and D the *halving* constant, i. e., the number of clichés which is to be added for halving the deficit. The constants vary from language to language (see table on page 27) and can be considered as indicators of the ease of learning the considered language, or the expressiveness of the language. Nevertheless, the aforementioned table does not give definitive values to these constants, because the material of the different languages studied is not adequate in the sense mentioned above and needs additional research.

The results of the research are the following:

1) The new method of statistical research is much superior to the previous ones in speed and gives results with remarkably less effort than these.

2) By means of the new method the author has discovered a general law, according to which the deficit of language knowledge is an exponential function of the magnitude of thesaurus (set of known clichés). As the exponential law controls different natural phenomena, the author considers this result the most important.

3) The mathematical expression of this law holds two constants, which vary from language to language, and are indicators of the ease of learning the considered language, or of the expressiveness of the same.

4) In spite of the fact that the results of this study are not exactly comparable because of the different bases in the statistics of different languages, they nevertheless show that the logical structure of a planned language, such as Esperanto, makes it much more expressive on the basis of a certain number of known clichés as any naturally developed language.

5) The author concludes, that these results may open a great field of research for the psycho-biology of human speech.

BIBLIOGRAFIO

- DANNEIL, HENRIKINO, 1928: Esplorado pri vortofteco en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. — Int. Pedagogia Revuo 7: 1—15.
 FERBER, EDNA, (El la anglalingva originalo tradukis BERNO FABO), jaro ne indikita: Fanny. 240 p.

han?

- JENSEN, ARTHUR M., 1946: English by the Nature Method. Johdanto ja selitys (finnlingva enkonduko). Helsinki. 47 p.
- 1946a: English by the Nature Method. Part I. Helsinki. 36 p.
- KAEDING, F. W., 1897—98: Häufigkeitswörterbuch der deutschen Sprache, Steglitz bei Berlin.
- NEERGAARD, PAUL, 1942: La Esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj. — [libro] Tra densa mallumo: 37—64. Kopenhago.
- OXFORD English Dictionary, The shorter, 1933: Volume I.
- PRIVAT, EDMOND, 1922: Karlo. Sepa eldono. Berlin. 45 p.
- RUBLEV, S., 1927: Provo de kvanta elementanalizo en la lingvo Esperanto. — Sennacieca Revuo 1927: 155—163. (Represo en la broŝuro »Kvardek jaroj«, Paris—Leipzig—Moskvo 1927).
- SCOTT, HERBERT M., 1945: Filatela terminaro Esp., a., fr., g., kun difinoj en Esp. — Internacia Esp.-Ligo, Jarlibro 1945, dua parto: 35—60. Rickmansworth.
- STANCLIFF, FENTO, 1933—34: Vortstatistiko. — Enciklopedio de Esperanto: 566—570.
- 1937: Aplikenda statistiko. — Bult. Int. Sci. As. Esp. n-ro 48: 4—5.
- 1938: La Zamenhofa adjektivaro. — Bult. Int. Sci. As. Esp. n-ro 52: 3—4.
- WACKRILL, ALFRED E., 1907: Konkordanco de Ekzercaro. 4+96 p. Paris.
- ZIPF, GEORGE KINGSLEY, 1936: The Psycho-Biology of Language. An Introduction to Dynamic Philology. London. IX + 336 p.

La akuzativo en Esperanto

el teoria kaj interlingvistika vidpunkto

de G. WARINGHIEN*)

La ekzisto de akuzativo en Esperanto estas ofte, por la komencantoj aŭ la eksteraj rigardantoj, objekto de surprizo kaj kritiko. Kaj eĉ por multaj uzantoj el okcidenta Eŭropo, tiu kazo estas ia ŝtono de falpuŝiĝo. Tial eble ne ŝajnos superflua la ĉi-sekva konsidero de la problemo.

I. La akuzativo en la naturaj lingvoj

En la vidpunkto de la ĝenerala gramatiko, akuzativo estas rimedo esprimi la transformon de subjekto al objekto. Ĉar, kiel bone demonstiris CH. BALLY (1946, § 190), »la substantivo, antaŭdestinita al la subjekta funkcio, estas la sola signo, kiu estas determinita, ne estante mem determinanto . . . Estas neeble koncepti procezon sen ia substanco, kie ĝi estiĝas«. Sed procezo estas malvolviĝado, evoluado, progreso — kaj estas tiel konforme al la natura irado de la penso esprimi la estiĝlokon de tiu procezo, kiel esprimi ĝian traflokon, celon aŭ koncernaton, t. e. la objekton de la verbo.

Povas ja okazi, ke kelkaj agoj estas prezentataj sensubjektaj (*pluvas*; *Temas pri . . .*) aŭ senobjektaj (*Haltu! Mi akuzas!*), sed en la granda plimulto de la okazoj la klareco postulas la esprimon kaj de la aganto kaj de la agato — kaj oni povus diri, ke la subjekto kaj la objekto formas kun la verbo la sanktan triunuon de la parolo.

Sekve, ĉar la substantivo estas esence pensata kiel subjekto, ĝi povas esti plue uzata kiel objekto nur helpe de ia gramatika rekonilo, kiu montros tiun transformon kaj precizigos tiun novan funkcion — t. e. helpe de iu m o r f e m o. Distingo inter la du ĉefaj funkcioj en la propozicio estas neevitebla neceso, kaj

*) profesoro agregacia, Universitato de Tours, Francujo.

fakte ĉiuj lingvoj ĝin obeas. Objekt-esprima morfemo ekzistas efektive en ĉiuj lingvoj de la mondo, kaj oni ne vidas, kiel lingvo povus malhavi tian. Sed ĝi ekzistas sub kvar diversaj formoj:

1) En ĉiuj antikvaj lingvoj kaj en kelkaj modernaj (germana, greka, litova, latva, slavaj) de la hind-eŭropa familio, oni trovas *a k u z a t i v o n*, kiu prezentas apartan kazon en la deklinacio de la substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj. La latina ekzemple kontraŭmetas *lupum timeo* (la lupon mi timas) al *lupus timet* (la lupo timas). La finaĵo de tiu kazo estis en la pralingvo *-n* je la singularo kaj *-ns* je la pluralo. Ekster la hind-eŭropa familio, akuzativon oni trovas ankaŭ en la hungara, finna, estona, turka, mongola k en kelkaj hindaj lingvoj.

2) En la japana lingvo oni trovas objekt-morfemon *p o s t p o z i c i a n*: la objekto estas montrata de postmetita vorteto »wo«, same kiel la subjekto de postmetita »ga«. Ekzemple *tegami wo kaite imasu* (leteron skribanta li estas) kontraŭmetiĝas al *ka-kubeki tegami ga iroiro arimasu* (skribendaj leteroj diversaj estas). La du formoj klare montriĝas en la proverbo *ippai hito sake wo nomi . . . sambai sake hito wo nomu* (je la unua glaso la homo la brandon trinkas, je la tria la brando la homon trinkas). Simila stato troviĝas en la hindustana (urdua) kaj parencaj lingvoj.

3) En la hebrea lingvo ekzistas objekt-morfemo *p r e p o z i c i a*, ordinare uzata en prozo antaŭ la determinitaj substantivoj kaj antaŭ la propraj nomoj; formo de tiu prepozicio estas »eth«. Ekzemple *wajevaqgeš laharog eth Moše wajjivraĥ Moše* (kaj li deziris mortigi je Moseo kaj forkuris Moseo). Tian staton ni trovas en kelkaj modernaj romidaj lingvoj, ĉe la nomoj de personoj aŭ de personigitaj aferoj; komparu la hispanan *busco a mi criado* (mi serĉas je mia servisto), *amar a la patria* (ami je la patrio) aŭ la rumanan *am întâlneț pe fratele tău* (mi renkontis je frato cia); ankaŭ en la gaskona dialekto oni povas trovi similajn konstruojn (BALLY 1946, § 253).

4) Fine, en la okcident-eŭropaj lingvoj (itala, portugala, franca, angla, nederlanda, dana, norvega, sveda) kaj en la ĉina, anama ktp. oni povas konstati la ekziston de objekt-morfemo *pozicia*, t. e. de sintaksa regulo, kiu trudas al la objekto devigan lo-

kon en la propozicio, ĝenerale senpere post la verbo. Ĉar ekzemple, se la franca *un chien regarde bien un évêque* signifas »hundon episkopo rajtas rigardi« kaj ne »hundon episkopo rajtas rigardi«, la kaŭzo estas, ke la postverba lokigo de »*un évêque*« havas sintaksan valoron egalan al tiu de la Esperanta *-n*: en tiaj lingvoj, la vortordo mem konsistigas la morfemon (VENDRYES 1921, p. 93).

Oni vidas do, ke la koncepto de la objekto estas komuna trajto de ĉiuj homaj lingvoj, sed ke ĝia lingva esprimo varias laŭ la landoj kaj epokoj. Efektive, en multaj okazoj, kiel en Eŭropo, tiel ankaŭ en Azio, la historio instruas al ni, ke al la fleksia akuzativo iom post iom substituiĝas unu alia formo. En Azio, la kompara lingvistiko demonstris, ke la ĉina kaj la anama posedis iam fleksiojn, kiuj ankoraŭ ekzistas sporade en arkaemaj dialektoj, sed ke ili foruziĝis kaj malaperis, lasante lokon al pozicia aŭ partikla morfemo. En Eŭropo, bona ekzemplo estas la franca, kiu el la 6 latinaj kazoj komence konservis nur du, unu por la subjekto kaj la alian por la ceteraj kazoj. Ekzemple la nominativo latina *nullus homo* fariĝis *nus hom*, dum la akuzativo *nullum hominem* fariĝis *nul home*. Tia estas la stato, kiun oni trovas en la malnovaj tekstoj, kia la Kanto de Rolando:

Unques nus hom tel chevaler ne vit

(jam neniu homo tian kavaliron vidis).

Soürs est Carles, que nul home ne crent

(trankvila estas Karlo, ĉar neniun homon li timas).

Sed tiuj fleksiaj restaĵoj estis tre neregulaj, kaj ili baldaŭ malaperis (jam ĉ. 50 jarojn post la verkado, la kopiisto de la ĉi-supra verso kulpis eraron kaj skribis »*nuls home*«!), la franca konfidis al la sola vortordo la esprimon de la objekta funkcio, kaj la inversio de la objekto fariĝis neebla, kiel oni vidos el la moderna traduko de tiuj versoj:

Jamais nul homme ne vit tel chevalier . . .

Charles est tranquille, car il ne craint nul homme . . .

Saman evoluon montras la araba lingvo; sub sia klasika (korpora) formo, ĝi ankoraŭ posedas fleksian akuzativon, kiu trans-

formiĝis en pozician morfemon en pluraj modernaj dialektoj.

Tamen ni devas rimarkigi, ke tiu evoluo ne estas unudirekta: se plimulto el la cititaj lingvoj ŝanĝis fleksian morfemon al pozicia, almenaŭ du aliaj, la hispana kaj la rumana, post la ruiĝo de la latina deklinacio, mem kreis al si, inter certaj limoj, novan prepozician morfemon.

Cetere estas diskutinda afero, ĉu tiun evoluon ne kaŭzis simple la fonetika eluzado de finaĵa malsonora konsonanto, kia -n, pli ĝuste ol la spirita tendenco al analiza lingvoformo. Ĉar apriorie la analizemo devus konduki al anstataŭigo de fleksia morfemo per prepozicia, paralele al la transformo de la aliaj kazoj en prepoziciajn adjektojn. Pozicia objekt-morfemo estas ne pli analizeca, ol la prepozicia. Apoge al tiu hipotezo, oni povus rimarkigi, ke aliflanke, en la ĉi-supre montrita dua grupo de lingvoj, la postpozicia morfemo ĉie rezistis, probable pro la pli fortika fonetika konsisto de ĝia esprimilo. Oni do ne devas lasi sin influi per la grandiozaj vortoj de »konformeso a la lingvala evoluciono« (COUTURAT), aŭ de »absolut modernissim paneuropan gramatica« (VON WAHL) ktp. por tranĉi, sen plua esploro, la malfacilan demandon pri la akuzativo: oni devas, tute male, zorge pesi ĉian elementon de la decido.

II. Avantagoj kaj malavantagoj de la akuzativo

El la kvar esprimmanieroj de la objekto, ni povas, koncerne nian studon, fari nur du grupojn: tiu, kiu esprimas la objekton sen fonetika morfemo, per la nura pozicio de la vorto en la frazo — kaj tiu, kiu ĝin esprimas per iu ajn fonetika morfemo; ĉar la tri formoj, kiujn povas ricevi tiu morfemo, havas proksimume la samajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn; inter ili oni devos elekti pro okazaj motivoj (oportuneco, konformeco al la lingvo-karaktero ktp). Male elekton inter la du grupoj decidus la konsidero de ĝeneralaj principoj.

Efektive, por pravigi sian pretendon anstataŭi la lingvojn naturajn, planlingvo devas ilin superi per pli granda facileco. Sed facileco de lingvo estas, malgraŭ la ŝajnoj, malsimpla ideo: ĝi dependas kompreneble de la grado kaj speco de instruiteco

de la koncernaj lernantoj unuflanke, ĝi dependas aliflanke de la harmonia kompenso de pluraj elementoj: simpleco, klareco, fleksebleco, regularco, stabileco, belsonco ktp. (WARINGHIEN 1946, p. 7—12; 1948, p. 77—78). Mi limigos min ĉi tie al la ekzamenado de la tri unuaj.

A. Akuzativo kaj la lingva simpleco

La postulato de simpleco en la L. I. pledas evidente por forigo de ĉia modifo en la formo de la vortoj — do por uzado de la nura pozicia objekt-morfemo. Sed mi ne konas uzatan planlingvon, kiu iris ĝis la fino de tiu tendenco, radikale forigante la akuzativon el ĉiaj vortoj: eĉ Occidental konservas ĝin ĉe la personpronomoj kaj ĉe la persona rilatpronomo: *noi-nos, vu-vos* ktp.; *qui-quem*.

B. Akuzativo kaj la lingva klareco

La postulato pri klareco puŝas kontraŭe al elekto de ia konkreta kaj ne nur abstrakta objekt-morfemo. Efektive, se oni observas la lingvojn, kiuj konas nur tian lastan, oni ne malfacile malkovros frazojn, en kiuj la manko de fonetika morfemo estigas sencodubon. Kaj ĉar tiun fakton la kritikantoj de Esperanto tro ofte ignoras (aŭ nescias?), mi permesos al mi iom detale insisti. Mi tiros miajn ekzemplojn egale el la ĉiutaga kaj el la literatura formo de la franca lingvo, por montri, ke ne temas pri eltorditaj, eksterordinare elpensitaj maloftaĵoj.

La okazojn, ĉe kiuj plena klareco estus atingebla nur pere de fonetika objekt-morfemo, oni povas klasi sub 4 ĉapitroj:

1) Elipsaj propozicioj.

Mr. de Talleyrand le reçut en prince (s-ro de T. akceptis lin kiel princo — aŭ — kiel princon).

Je vous aime comme un frère (mi vin amas kiel frato — aŭ — kiel fraton).

Il insulta le président plus violemment encore que l'orateur précédent (li insultis la prezidanton eĉ pli krude, ol la antaŭa oratoro — aŭ — ol la antaŭan oratoron).

Je n'ai pas d'autre appui que vous (mi ne havas alian apogon, ol vi — aŭ — ol vin).

... comme si le temps, ainsi que le vin, rendait les poésies meilleures — J. DU BELLAY (kvazaŭ la tempo, same kiel la vino, plibonigus la poeziaĵojn — aŭ — same kiel la vinon).

Le crime fait la honte et non pas l'échafaud — TH. CORNEILLE (la krimo estigas la honton, kaj ne la eŝafodo — aŭ — kaj ne la eŝafodon).

Et Virgile écoutait comme j'écoute et l'eau

Voyait passer le cygne auguste, et le bouleau

Le vent, et le rocher l'écume, et le ciel sombre

L'homme . . . V. HUGO. (Kaj Virgile aŭskultis kiel mi aŭskultas, kaj la akvo vidadis pasi la majestan cignon, kaj la betulo la venton, kaj la roko la ŝaŭmon, kaj la malluma ĉielo la homon . . . — oni komprenas unuavide: la cignon kaj la betulon, la venton kaj la rokon, la ŝaŭmon kaj la ĉielon . . .)

2) Objektaj predikativoj.

Je trouvais ce fruit délicieux au cours de mes longues promenades (mi trovis tiun frukton bongustan dum miaj longaj promenadoj — aŭ — mi trovis tiun frukton bongusta dum . . .)

J'estime l'Essai sur l'Homme, de Pope, le premier des poèmes philosophiques — VOLTAIRE (mi estimas la Eseon pri la Homo, de Pope, la unuan el la filozofiaj poemoj — aŭ — la unua el la filozofiaj poemoj).

3) Apozicioj.

Fidèle ou non, il l'aimait (fidela aŭ ne, li ŝin amis — aŭ — fidelan aŭ ne, li ŝin amis).

François-Joseph télégraphia à l'archiduc Rodolphe qu'il le recevrait, seul. (Francisko-Jozefo telegrafis al la arkiduko Rudolfo, ke li akceptos lin, sola — aŭ — solan).

Il aimait son fils, ce vainqueur — V. HUGO. (li amis sian filon, tiu venkinto — aŭ — tiun venkinton).

Je t'aimais inconstant, qu'aurais-je fait fidèle? J. RACINE. (mi vin amis perfida, kiom pli mi vin amus fidela! — aŭ — mi vin amis perfidan, kiom pli mi vin amus fidelan!)

4) Inversioj.

On ne savait pas alors quel poète étouffait en lui le savant (oni tiam nesciis, kia poeto sufokis en li la scienciston — aŭ — kian poeton sufokis en li la sciencisto).

Il avait dans la terre une somme enfouie — LA FONTAINE. (li havis monon enfositan en la tero — aŭ — li estis enfosinta monon en la tero).

. . . *ce foudre ridicule,*

Dont arme un bois pourri ce peuple trop crédule — P. CORNEILLE.

(tiu ridinda fulmo, per kiu iu putrinta ligno armas tiun tro kredeman popolon — aŭ — per kiu iun putrintan lignon armas tiu tro kredema popolo).

Se, post rapida traserĉo, mi kapablis trovi tiom da ekzemploj de sencodubo, kaj en lingvo, kiun oni ĝenerale rigardas kiel plej klaran kaj precizan, kiom da tiaj aliaj oni povus kolekti el la diversaj planlingvoj, kiuj rezignis pri la helpo de akuzativo! Lasante flanke la jam eksmodiĝintan »Latino sine Flexione« de PEANO kaj la ankoraŭ ne plene eloviĝintan »Interlingua« de IALA, mi limigos mian demonstradon al la »Occidental« de VON WAHL. Ĉiujn miajn ekzemplojn mi ĉerpis el publikigitaj tekstoj, krom la unua, eltirita el privata letero. Oni facile rimarkos, kiel la gramatika malriĉeco de tiu lingvo (simileco de preterito kaj de preterita participo, nevarieco de la adjektivo kaj de la rilatpronomo *quel* ktp.) kunigita kun la fiera pretendo de VON WAHL al »absolut liberté de construction«, multigas la okazojn de miskompreno.

1) Elipsoj.

Noi conosse altri scientistes quam sr M. (ni konas aliajn sciencistojn, ol s-ro M. — aŭ — ol s-ron M. — aŭ — kiel s-ron M.).

Li tempore passat, H. esset passabilmen patetic (la tempo pasis, H. estis ne malmulte emociema — aŭ — la pasintan tempon, H. estis . . .).

2) Objektaj predikativoj.

Il conosse anc tro mult detalies por posser vider li coses integri (li scias ankaŭ tro multajn detalojn, por povi vidi la aferojn integrajn — aŭ — integraj).

3) Apozicioj.

. . . *pictura, quel monstrat li combatte ye Worcester, por li scotes tam sinistri* . . . (penetraĵo, kiu montris la batalon ĉe W., por la skotoj tiel timigan — aŭ — timigaj).

li nùmere del conosciellant electronos, queles emisse li disperset radiation prendet per atom, es quasi egal a . . . (la nombro de la kunoscilantaj elektronoj, kiuj elsendas la disan radiadon prenitan po unu atomo, estas kvazaŭ egala al . . . — aŭ — prenita po unu atomo — aŭ — prenita po unu atomo . . .)¹⁾.

Lu poc quo restat in mi memorie yo prova fixar ci, forsan tre disparat e incoherent, sovente retornant a anteriori témpores o ja anticipante posteriori evenimentes (la malmulton, kiu restas en mia memoro, mi provas fiksi ĉi tie, eble tre misharmonia kaj nekohera, ofte revenanta al antaŭaj tempoj aŭ jam anticipante postajn okazaĵojn — aŭ — misharmonian kaj nekoheran — aŭ — misharmonie kaj nekohere).

4) Inversioj.

Senior R.-O. abusa li idé que just Latin es international (s-ro R.-O. trouzas la ideon, ke nur la latina estas internacia — aŭ — s-ron R.-O. trompas la ideo, ke . . .)²⁾.

Occidental, quel clar subtene li heredit classic-cultural base de Europa, es li natural lingue commun del cultivat Occidente (ĉu la aŭtoro pensis: »Occidental, kiu klare subtenas la hereditan klasik-kulturan bazon de Eŭropo« — aŭ — »Occiden-

¹⁾ Mi supozas, ke »prendet« signifas »kalkulita«; cetere la relativa propozicio povus ankaŭ signifi »kiujn elsendas la disa radiado«.

²⁾ Tiu mallonga frazo havas historion. Ĝin mi citis unuafoje en unu mia franclingva broŝuro (WARINGHIEN 1946), kun jena komento: »vere bedaŭrinda dusenceco ĉe lingvo, kiu pretendas la ĉampionecon de la okcidenta kulturo«. Kaj mi konfesas, ke, ne montrante la fontlokcon de mia citaĵo, mi esperis, ke bonvola kontraŭulo apogis mian demonstiron per erara interpretado; tiu eta makiavelaĵo ne malprosperis: en posta numero de »Cosmoglotta«, s-ro R. BERGER honoris mian broŝuron per longa recenzo, en kiu li interalie skribis: »It es amusant constater que li sol exemple quel un Esperantist posset trovar til hodie in li tot litteratura de Occidental por criticar li supression del obligatori acusative es un exemple fals . . .«, kaj li konkludis, ke la frazo de von WAHL povas havi nur la unuan signifon. Kiel bedaŭrinde, ke ĝuste la duan la aŭtoro donis al ĝi! — Tiom pri la »exemple fals«; kaj pri la »sol exemple in li tot litteratura de Occidental«, oni nur legu plu, ne forgesante, ke tiu tuta literaturo limigas sin al du-tri monataj malgrandformataj revuetoj kaj al kelkdeko da plejparte propagandaj aŭ instruaj libroj.

tal, kiun klare subtenas la heredita klasikkultura bazo de Eŭropo«? Vetoj estas atendataj).

Multigi la ekzemplojn estus tede; nur ankoraŭ unu lasta, pruntita de la aŭtoro mem de tiu lingvo-projekto:

Sententie de Saadi

Un pantere amnestiat

mult mutones condemnat

— eta ĉefverko, kiu havas pli da signifoj, ol ĝi estas dika: ses, se mi bone kalkulas:

1. Unu pantero amnestiis multajn ŝafojn kondamnitajn;
2. Unu pantero amnestiita multajn ŝafojn kondamnis;
3. Unu panteron amnestiis multaj ŝafoj kondamnitaj;
4. Unu panteron amnestiitan multaj ŝafoj kondamnis;
5. Unu pantero amnestiis (,) multaj ŝafoj kondamnis;
6. Unu pantero amnestiita (,) multaj ŝafoj kondamnitaj.

Ĉu bezonaj pluaj ekzemploj, por pruvi, ke lerte reklameblan simplecon oni povas akiri nur je la kosto de la klareco?

Oni probable kontraŭdiros, ke, se tiuj frazoj estas efektive dusencaj (kaj, se mi diras *du* . . .), tamen la ĉirkaŭteksto permesas ilin senerare kompreni. Tio estas ofte vera, sed ne ĉiam; kaj oni devas konfesi, unue, ke ĉiam ekzistas la risko, ke tiu ĉirkaŭteksto mankas aŭ mem ne estas sufiĉe preciza por eviti ĉian konfuzon; due, ke ekzistas aparte gravaj tekstoj — filozofiaj, juraj, sciencaj — ĉe kiuj subtilo de la penso nepre postulas, ke ĉia eĉ plej malprobabla dubo estu sisteme eliminata; trie, ke, se en niaj malnovaj lingvoj, al kies ideoĉenoj kaj vortoligoj ni denaske al kutimiĝis, ni povas sufiĉe sekure diveni la ĝustan respondon, en planlingvo, kiu estas kaj longe restos nenies patra lingvo, kaj kiun nekonscie ĉiu pli-malpli strikte modeligas laŭ sia propra, la ŝancoj ĝuste trafi sencon de la verkinto aŭ parolinto estos konsiderinde malpli multaj; kvare, ke tiujn ŝancojn eĉ pli malmultigos la fakto, ke pro simpleco planlingvoj senigis sin je pluraj gramatikaj iloj, kiuj laŭokaze povas helpi en la naturaj lingvoj al klarigo de konfuzo (ekz-e la genra akordo de la adjektivo en la franca, la triapersona -s en la anglaj prezencaj

verboj ktp). De tiu pli granda malcerteco de la kompreno en planlingvoj, sekve de pli granda malriĉeco de ilia gramatiko, mi citos nur tri tipajn ekzemplojn:

La ĉefa specialisto de Ido, s-ro DE BEAUFONT, iam kronis unu sian artikolon per jena bumeranga titolo: »*La lingvo supleanta Ido*« — kio signifas ne nur »la anstataŭa lingvo Ido«, sed ankaŭ, ho ve! »la lingvo anstataŭanta Ido«!

En idista propaganda kunveno, en 1911, germana oratoro deklaris: »Gramatiko donis a ni la logiko!« (ĉar, fidele al sia patra lingvo, li akcentis la objekton per inversio); la tradukanto, kiu estis franclingva belgo, tradukis naive, laŭ la spirito de sia propra lingvo: »La grammaire nous a donné la logique!« (gramatiko donis al ni logikon).

En occidentala propagandilo, mi legas la frazon: »Li max bon comprehension del nature del lingue monstra Occidental«. Kiel estus eble, ke la ordinara franco aŭ anglo ne tuj traduku: »La plej bona kompreno de la naturo de la lingvo montras Occidentalon«?

Oni povas respondi al mi, ke tiuj frazoj estas eraroj de la aŭtoroj, kaj ke oni ja povus esprimi sin tre klare, ne uzante akuzativon sed intermetante la adjektivon en la unua frazo kaj rezignante pri la inversio en la du sekvantaj. Tute konsentite, sed kial do la bonaj verkistoj, kiuj ilin skribis, tion ja ne faris? Ĝuste ĉar ili ne ekkonsciis la eblojn de konfuzo. Kaj se ili, ĉe sia tuta sperto kaj talento, ĝin ne konsciis, kio pruvas al ni, ke morgaŭ aliaj ne same eraros? Neeviteble, tio estos senĉese la okazo, tiel longe dum interparolos homoj, kies penso formiĝis en diverĝaj lingvo-sistemoj.

C. Akuzativo kaj la lingva flekseblo

Ni vidis, en pluraj el la ĉi-supraj ekzemploj, ke la uzo de inversioj en senakuzativa lingvo ĉiam riskigas miskomprenojn. Efektive, malgraŭ la aserto de VON WAHL, la du kvalitoj, ekstreme malriĉeco de la gramatiko kaj absoluta libero de frazkonstruo, ne povas pace kunekzisti. Mi scias ja, ke VON WAHL provis de tiu lia aserto liveri almenaŭ unu pruvon: du paĝojn tradukitajn el GOGOL. Sed kvankam li singarde elektis sian tekston

kaj alportis grandan zorgon al la traduko, la rezulto estas vere malkuraĝiga. Oni nur tralegu jenajn frazojn:

»Jace e estende se li grandi Mediterran mare e de tri divers láteres regarda a it li ardent costes de Africa con fin palmes, li Syrian calvi desertes e li denspopulat, tut disfossat per li mare rive de Europa . . . Dissipat ha su liber colonies li gayi Grecia. Formica in li Mediterran mare insules . . . Prestressas, jun e gracil, con disbalayat bucles, inspirat ha plongeate su nigri ocules . . . Ye glorie, glorie sitia, oh hom! In li storm del inracontat gayitá, asurdato del son de ferre, vola sur li cludet scudes del guerriker legiones! . . . Ad oriente directet su humid de delicie bell ocules anc Grecia . . . Un povri village, apoyat al denu-dat collines, rar, inegalmen adombrat per exsiccato figuieros . . . Comensat revar li antiqui Egypte ornat per hieroglyphes, abasante plu su pyramides . . .« (PIGAL, 1930, p. 173—175).

Eĉ preteratentante la dusencaĵojn (kiu estas la subjekto de »dissipato«: »colonies« aŭ »Grecia«? Ĉu »inspirato« estas adjektivo — rilata al »prestressas«? aŭ al »buckles«? — aŭ adverbo? Ĉu »formica« estas substantivo — *formiko* — aŭ verbo — *svarmi* —? Ĉu »sitia« kaj »vola« estas indikativoj aŭ imperativoj? Ĉu »adombrato« determinas »village« aŭ »collines«?) kaj la maller-taĵojn (kion signifas »ha plongeate su ocules«? »inracontato gayitá«? »li cludet scudes«?); eĉ preterlasante la penon, kiun kultu-rita okcidentano devas fari por kompreni tiujn frazojn, kun ilia artifice distordita konstruo; eĉ malzorgante la fakton, ke orientano neniam povos diveni, sen longa trejno kaj lernado, kial oni devas serĉi la subjekton jen antaŭ la verbo, jen post la verbo, jen post la objekto ktp.; ĉu do, el la simpla vidpunkto de la legado, la ĉi-supraj frazoj ne efikas, kiel amaso da disaj, senkoheraj, neligitaj vortoj? Disjeka membra . . . Nenio ilin kunigas, konstruas en implikatan, organisman tuton. Oni nur relegu: »disfossato per li mare rive de Eŭropa . . . su humid de delicie bell ocules anc Grecia . . .« La vortoj, lasitaj al sia propra sorto, senigitaj je rekoneblaj karakteriziloj, surprizas la vidon kaj ne kontentigas la spiriton. Prave skribis iam AYMONIER (1913, p. 52): La akordo de la vortoj, kiuj ludas saman rolon, kaj la marko de tiu rolo per samaj karakteriziloj estas unu el

la plej certaj rimedoj por reciproka interkompreno. Same kiel en la konversacio la orelo asocias similajn vortfinaĵojn, en lego ankaŭ la okulo proksimigas kaj grupigas la vortojn, laŭ iliaj finaj similaĵoj». Oni nur komparu la efekton de jena esperantigo de la citita teksto (mi ne estas certa pri mia interpreto de la ĉi-supre montritaj dubaĵoj):

»Kuŝas kaj etendiĝas la granda Mediteranea maro kaj de tri diversaj flankoj ĝin alrigardas la ardaĵ bordoj de Afriko kun delikataj palmoj, la Siriaj kalvaj dezertoj kaj la bordoj de Eŭropo, dense loĝataj, tute distranĉitaj de la maro . . . Dissemis siajn liberajn koloniojn la gaja Grekio. Svarmas en la Mediteranea maro insuloj . . . Pastrinoj, junaj kaj graciaj, kun disbalaitaj bukloj, inspire dronigis siajn nigrajn okulojn . . . Gloron, gloron soifu, ho homo! En la tempesto de l' nerakontata gajeco, surdigita de l' sono de fero, flugu sur la kuntenatajn ŝildojn de l' militportaj legioj! . . . Al oriento siajn belajn okulojn, humidajn de ĝuo, turnas ankaŭ Grekio . . . Iu malriĉa vilaĝo, apogita al nudigitaj montetoj, maldense, neegale ombrata de sekiĝintaj figarboj . . . Komencas revii la antikva Egipto, ornamita de hieroglifoj, plu malaltigante siajn piramidojn . . . « Ĉu tio ne donas tuj la impreson, ke nova, animiga, unuiganta spirito cirkulas tra tiu, antaŭe diserigita teksto? La vortoj revestis sin per siaj finaĵoj, ligis denove sin unu al la alia en flekseblaj artikigoj — reviviĝanta ostaro, denove tegita de karno kaj nutrata de fluanta sango.

Eĉ la plej talentaj verkistoj ne povas fari miraklojn. Ni ĵus vidis, kiel artifice von WAHL tiris sin de sia teksto; kiel do, ĉe sia tuta lerto, li estus traktinta la sekvantajn frazojn, en kiuj la Esperantaj tradukintoj senpene kaj elegante reproduktis la ritmon kaj la signifon de la originalo?

»Vian popolon ne plagu!« — BIBLIO. (En Occidental: *vor popul ples ne tribular!* »popolo« aspektus subjekto).

»Brunan, grasan, viglan, sankta Pakomo estus ŝin aminta« A. FRANCE. (En Ocidental, la adjektivoj rilatus al Pakomo, aŭ estus komprenataj adverboj).

»Neesprimeblan vi petas, reĝin', renovigi doloron!« VIRGILO.

»Popol' rigardas iri, palajn de teruro,

Nudpiede, la kaptitojn . . . « V. HUGO (En Occidental, »palajn« rilatus al »popolo«).

» . . . Ili paŝis,

Tenante la armilon ĉe l' brak', la frunton alta,

Seriozaj kaj stoikaj . . . « V. HUGO (En Occidental, »seriozaj kaj stoikaj« rilatus al »frunton«).

»Ĉu la fadenojn de la vivo, teksitajn por mi en la transa vivo, mi ne povas tiel facile disŝiri, kiel ĉi tiun?« SCHILLER (En Occidental oni ne scius, ĉu »teksitajn« rilatus al »fadenojn« aŭ al »vivo«, nek ĉu »ĉi tiun« estas rilatigota al »mi« aŭ al »fadenojn« t. e. ĉu ĝi estas nominativa aŭ akuzativa).

Ni iru eĉ pli malproksimen: ĉu jenajn originalajn frazojn oni povus traduki en la occidentalan, konservante samtempe la ritmon kaj la klarecon?

»Eternon mi balbutas, senlimon, ho Mistero!« (KALOCSAY)

»La bruston peza vivo senkompata

Jen premas plata, senespere plata . . . « (La sama).

»Disajn tra l' mondo, fermitajn en landniĉoj,

dum batas nin je ĉi tragika hor'

la sanga mar' de l' praaj superstiĉoj,

fidela, fratoj, restu nia kor'! (G. E. MAURA).

»Envolvitajn en littukoj, makulitaj de sango kaj puso, kaŝitajn en litkovriloj, ni vidas mizerajn homajn korpojn preterpasi sur portiloj, ĉebrake subtenatajn de studentoj . . . « (A. MUZZIOLI)¹⁾.

Kompreneble, temas ĉi tie pri literaturaĵoj . . . Sed kiu skribis, kaj prave: »La lingvo estas necesa, ne sole por skribado de poŝtkartoj kaj privata interparolo kun samideanoj, sed ankaŭ por ĉiutaga parolado kaj retoriko, politiko kaj literaturo, prozo kaj poezio, scienco kaj arto . . . «? Ĉu ne unu eminenta probatalanto de Occidental, s-ro A. Z. RAMSTEDT? Kiu deklaris, kaj prave: »Tiuj, kiuj limigas la servon de Lingvo Internacia al interparolado pri komercaj aferoj kaj al komerca korespondado, povas neatenti la lingvan flekseblecon kaj preferi rigidecon; sed por fidele traduki ĉiuspecajn verkojn, skribitajn en ĉiaj lingvoj, la

¹⁾ Eble estas interese akcenti, ke tiujn du lastajn ekzemplojn skribis du aŭtoroj, kies patra lingvo ne konas akuzativon.

Lingvo Internacia devas kontraŭe posedi kiel eble plej grandan malrigidecon kaj flekseblecon, neniom perdante la klarecon . . . »? Ĉu ne la aŭtoro mem de Ido, s-ro COUTURAT, en sia historia kritiko de la planlingvoj? (COUTURAT & LEAU). Cetere pri tiu punkto ĉiuj kompetentaj interlingvistoj konsentas: ni aŭskultu ankoraŭ la opinion de konata lingvisto kaj esperantisto, D-ro W. E. COLLINSON (1924, p. 9): »La ĝenerala demando pri la uzo de akuzativo estas intime ligita kun tiu de la vortordo. Sperto montris, kia grandvalora helpo por la parolanto kaj la skribanto estas ia elasta vortordo. Ia nereduktebla minimumo da fleksio ne estas tro peza pago por unu privilegio, kiu ebligas al la verkanto doni pli da reliefo al siaj ĉefideoj kaj atingi pli kontentigajn ritmefektojn«.

Oni povas do senhezite konkludi, ke la Lingvo Internacia devas kontentigi tiom la postulojn de la artisma, filozofia aŭ diplomatia lingvo, kiom tiujn de la ĉiutaga. Kaj tion ĝi ne povos fari sen ia karakterizilo de la objekto, kiel, en la ĵus citita verko, konfesis COUTURAT mem: »Aŭ la Lingvo Internacia havos akuzativon, aŭ ĝi ne havos liberecon de vortordo!«

III. Kial Esperanto havas akuzativon

Jen do resumo de la diversaj motivoj por kaj kontraŭ la starigo de fleksia akuzativo. Kia, antaŭ tiu situacio, estis la sinteno de la interlingvistoj? Unuavide, ŝajnas, ke oni povus rimarki inter ili la saman evoluon, kiun ni montris ĉi-supre ĉe la naturaj lingvoj: Volapük (1880), tiu kvazaŭ-latino de la planlingvoj, konis ankoraŭ 5 kazojn; Esperanto (1887), simila al la mezepoka franca lingvo, ilin reduktis al du, nominativo kaj akuzativo; Ido (1907) igas tiun lastan kazon nedeviga; Occidental (1922) forigas ĝin, krom ĉe la personpronomoj.

Sed tiu plaĉa perspektivo estas erara: jam en 1889 J. LOTT ĉe sia Mundolingue, jam en 1903 PEANO ĉe sia Latino sine Flexione forlasis ĉian fleksian akuzativon, eĉ pli komplete ol Occidental; kaj aliflanke O. JESPERSEN, ankoraŭ en 1928 ĉe sia Novial, ne nur konservis la nedevigan fleksian akuzativon de Ido (poste ŝanĝita al prepozicia objektmorfemo), sed eĉ kreis novan kazon, unu genitivan per -n (MANDERS, 1947, p. 233).

Eĉ pri Esperanto, la demando ne estas tiel simpla, kiel imagas al si multaj el niaj kontraŭuloj, kiuj naive — kaj malŝate — atribuas la konservon de fleksia akuzativo en Esperanto al la slavlingveco de ĝia aŭtoro. Oni malofte rimarkis, ke en tiu primitiva formo de lia lingvo, kiun montras al ni la fragmento citita en la »Letero al BOROVKO« (WARINGHIEN, 1948, n-ro 92 a), kaj antaŭa je 2 jaroj al la apero de Volapük, akuzativo tute ne ekzistas: komparu la du versojn:

»La tot' homoze in familje
Konunigare so debà!«

kun la traduko »la tuta homaro en familion kununuigi sin devas«.

En posta formo de la sama lingvo, kiun mi nomis Pra-Esperanto II, kaj kiun konigis al ni kajereto de 1881—2, la fleksia akuzativo estas en plena provado: en 8 el la 9 pecoj tie kuŝantaj, la akuzativa finaĵo -l almetiĝas nur al la pronomoj; ekzemplon donos la fino de la tiutempa teksto de la fama poemo »Mia Penso«:

»Oh! plejhota! ej la sorto
Tropi mol volé,
Nuk e tuj rompo ma forto,
Dum mo es speré!«

(T. e.: »Ho! Plejalta! se la sorto — Trompi min volas — Nun kaj tuj rompu mian forton — Dum mi ankoraŭ esperas!«). En unu sola peco, traduko de »La Rabistoj« de Schiller, tiu akuzativo estas provata ankaŭ ĉe la substantivoj (»blessi tal fradral kordol«: vundi ĉian fratan koron).

Tiuj faktoj pruvas, ke, se ZAMENHOF enkondukis la fleksian akuzativon en la definitivan formon de sia lingvo, tion li faris post multaj provoj kaj naŭjara konsiderado. Alia fakto montras la gravecon, kiun li poste atribuis al la ekzisto de tiu kazo: kvankam, en sia reform-projekto de 1894, sub la influo kaj financa premado de TROMPETER, li ĝin rezignis (ZAMENHOF

1907, p. 5), poste, kiam dum la Idokrizo li ellaboris projekton pri reformoj por interkonsentigi la Delegacion kaj la esperantistaron, malgraŭ la postulo de OSTWALD, ke la akuzativo malaperu, li konsentis igi ĝin nedeviga nur ĉe la lokaj kaj tempaj adjektoj, sed obstine konservis ĝin »por la pli necesaj okazoj«, t. e. por montri la objekton (WARINGHIEN 1949, n-ro 337). Certe li havis por tia persisto en la sama opinio konsiderindajn motivojn, kiujn diveni estas eble.

En efektiveco, la elekto de la diversaj kreintoj de Lingvoj Internaciaj dependis precipe de la maniero, kiel ili konceptis ĝin kaj de la celo, kiun ili proponis al si.

Por tiuj, kiuj sekvante la vojon tre klarpense montritan jam en 1904 de ANDRÉ BLONDEL (WARINGHIEN 1948, n-ro 71), volas, ke la Lingvo Internacia estu kiel eble plej simila al la romidaj lingvoj, por VON WAHL same kiel por la kunpatroj de IALA, la demando pri fleksia akuzativo povas ekzisti nur ĉe la pronomoj: ĉe la substantivoj kaj adjektivoj ne povas temi eĉ pri momenta hezito.

Sed por tiuj, kiuj konsiderante la tutmondan skalon de apliko de Lingvo Internacia, ne volas simie kaj sklave ligi ĝin al certa tipo de malvasta lingvo-familio, sed depostulas por tiu komuna ilo de la tuta homaro pli grandan aŭtonomecon, pli grandan liberon por la elekto de ĝiaj materialoj, tiam la demando pri akuzativo ĉe la substantivoj restas por diskuti.

Vere estas, ke, en ok el dek okazoj, la naturaj lingvoj metas la objekton post la verbo, tiel ke, ĉe unu planlingvo, la akuzativo kaj la pozicia morfemo havas la saman funkcion kaj senutile duobligas unu la alian. La tento estas granda deklari la akuzativon pleonasma kaj ĝin forigi.

Tamen, el la dek restas du okazoj, ĉe kiuj la akuzativo sola savus la sencoklaron. Oni eĉ povas diri, ke ĉe planlingvo tiu proporcio estus pli alta, ĉar, kiel ni vidis ĉi-supre, pro la neevitebla heterogeneco de ĝiaj uzantoj, lingvo internacia donos okazojn de miskompreno ankaŭ tie, kie la naturaj lingvoj kapablas preterpaŝi tiun ŝtonon de falpuŝiĝo.

La demando estas do, finfine, ĉu lingvo, kiu aspiras fariĝi vere internacia, t. e. fariĝi la rimedo de perfekta interkompre-

niĝado inter parolantoj de plej diverssistemaj naturaj lingvoj, povas lasi en si lokon al hezito, al dubo, al malklaraĵoj? Ĉu ĝi rajtas kalkuli je la divenpovo de ĝiaj uzantoj, alidire allasi al ili eblojn de eraro? La respondo estas, laŭ mia opinio, evidenta per si mem.

Kaj se la pagota prezo ŝajnos al ni tamen alta, ni almetu, por faciligi niajn bedaŭrojn, sur la alian pesiltason la konsideron pri la grandega, kaj de ĉiu konfesata, dezirindeco de plene libera vortordo. Jen sufiĉe por pravigi ZAMENHOF.

Restas nur por esplori, ĉu oni uzu tiun akuzativon en ĉiuj okazoj, aŭ nur tie, kie ĝi estas necesa por eviti sencodubon. Tiu ĉi lasta formulo estis elektita de COUTURAT por Ido kaj de JESPERSEN por Novial. Ĝi estas tre alloga, ĉar ĝi konservas samtempe la avantaĝojn de la akuzativo kaj grandaparte evitas la ŝarĝon, kiun ĝi pezigas sur la frazo. Tamen la fakto, ke ZAMENHOF, en sia tre fidinda lingvo-instinkto, neniam haltis ĉe tiu formulo, estigas kelkan dubon pri ĝia efektiva valoro. Kiaj estas do la meritoj de tia solvo?

Pli simpla, ĝi evidente estas. Pli facila? Ne, ĉar por konscii, ke la objekto staras antaŭ la verbo, oni ja devas ankaŭ scii, kio estas objekto; same pri la objekta predikativo ktp. Almenaŭ, ĉu sekura? Malgraŭ la ŝajno, mi opinias, ke ne: la parolanto aŭ la verkanto, ne kutimiĝinta al la uzado de tiu kazo, ĉar en sep aŭ ok el dek okazoj li ĝin ne uzas, riskas tre ofte forgesi, ke ĝuste en tiu ĉi inversio, en tiu ĉi elipso ĝi fariĝas escept-okaze deviga. Kaj la aŭskultanto aŭ leganto, kiam li en unu duba okazo konstatos mankon de akuzativo, neniam ĝuste scios, ĉu tiu manko estas la rezulto de intenco aŭ de forgeso. Unu konata lingvisto iam humure skribis: »Ke la finaĵo akuzativa ne estas ia luksaĵo, plej bone evidentiĝas el tio, ke ĉiuj reformistoj, kiuj kritike mallaŭdis Esperanton tiurilate, malgraŭ ĉio en siaj propraj lingvaj projektoj konservis la akuzativon, tamen tiamaniere ke ili aŭ limigis ĝin al la pronomoj aŭ ili provizis la akuzativan finaĵon per specialaj klaŭzoj, laŭ la stilo bonkonata el la fervoj-vagonoj pri alarmobremso: »*Uzota nur ĉe efektiva danĝero. Senrajta uzo estos punata*« (COLLINDER 1938, p. 58—59). Kaj ĝuste same okazas pri la nedeviga akuzativo, kiel pri la alarmobrem-

so: ĝi plejofte neniel utilas, ĉar la danĝeron oni konsciis nur post la katastrofo.

Lastan argumenton mi devas mencii, favore al la deviga uzo de la akuzativo, t. e. la kongruenco kun la strukturo mem de Esperanto. Sed tio estas alia temo, kiun mi eble tuŝos en aparta artikolo.

*

Ni povas do konkludi, post detala esploro, ke, se Esperanto havas devigan akuzativon, tio ne devenas de mi ne scias kia malklereco ĉe ĝia aŭtoro; tio ne mallevas ĝin ĝis la rango de »barbara ĵargono«, kiel volus kredigi al ni neseriozaj pamfletistoj, aŭ de »groteska arbitraĵo« (grotesk Willkür), kiel iam nomis ĝin von WAHL en bedaŭrinda koler-impulso. Ni ĉiuj scias ja, ke ĉe la homaj aferoj oni tre malofte havas por elekti inter bono kaj malbono: en la kutima irado de la mondo, la homa saĝo estas nur el du malbonoj pli malgrandan elekti. Neniam ZAMENHOF, nek la esperantistoj kaŝis al si la malavantaĝojn de la akuzativo deviga; sed ili ĉiam konsciis, ke tio estas la neevitebla kompenso de tre realaj kaj alte ŝatindaj avantaĝoj.

Sed tiuj avantaĝoj estas percepteblaj nur ĉe certa grado de solideco en la penso kaj de delikateco en la stilo; ili evidentiĝas plene nur en tekstoj, kiuj celas esprimi kaj ne nur babili. Kaj sama estas la afero pri aliaj lingvaj grandvaloraĵoj: ilin oni atentigas nur, kiam oni rigardas pli alte ol la nivelo de la feliĉonaj frazoj. La interlingvistikaj diskutoj plenplenas pri rimarkoj, kritikoj, proponoj ktp. rilataj al la fonetiko kaj morfologio, t. e. al la eksteraĵo de la parolo; pri la sintakso, pri la stilistiko, t. e. pri ĝia internaĵo — nenia raporto! Oni ĉiam havas en la buŝo la vortojn de okcidenta kulturo, de moderna civilizo — kaj oni vere kredigus, ke tiu kulturo aŭ civilizo kuŝas tuta en la formo de tiu aŭ alia sufikso, en la elekto inter finaĵa aŭ partikla konjugacio! Nun venis vere la tempo doni iom pli da seriozeco al tiuj supraĵaj, kaj tro ofte pasiaj, polemikoj, kaj senpartie pritrakti la lingvajn demandojn kun konsidero al la altaj kaj noblaj uzoj, al kiuj devas antaŭ ĉio servi la Lingvo Internacia. Oni jam sufiĉe demonstris, kaj ĉiam egale facile demonstros, ke oni povas verki propagandajn broŝuretojn, rakon-

ti amuzajn anekdotojn aŭ traduki vulgarigajn artikolojn, ne bezonante helpon de akuzativo, de akordiĝanta adjektivo, de subtilaj subjunkcioj ktp. Alia afero estus, se temus pri la traduko de la Biblio aŭ de la Odiseado, de la Infero aŭ de Faust, de la Madach-a Tragedio de l'Homo aŭ de la Mickievic-a Sinjoro Tadeo, de la sanskrita Bhagavad-Gita aŭ de la itala Vivo de Kristo . . . Sed, konfesinde, por ekvidi tiajn altajn perspektivojn, nur Esperanto pruvis sin sufiĉe granda . . .

Résumé

L'auteur étudie d'abord les différents moyens dont usent les langues naturelles pour marquer le complément d'objet direct, cas, préposition, postposition, ordre des mots. Il montre que ce dernier moyen d'expression tend à devenir prépondérant, mais que cette évolution n'est pas générale, n'atteignant pas les langues à postposition; dans certaines langues romanes même l'emploi de prépositions concurrence l'ordre des mots comme moyen d'expression de l'objet. On peut donc légitimement se demander si le recours à l'ordre des mots ne provient pas plutôt de l'usure phonétique de la finale casuelle, que de l'exigence analytique de l'esprit moderne — exigence que la préposition satisferait tout autant.

La question qui se pose pour les langues artificielles est donc de peser les avantages et les inconvénients de chacun de ces moyens d'expression, puisque l'évolution des langues naturelles n'impose pas l'un d'eux d'une façon absolue. L'auteur montre alors, que l'existence d'un accusatif est une charge assez pesante pour la langue, mais que d'autre part la clarté et la flexibilité y gagnent d'une façon inappréciable: et comme ce sont là deux des qualités essentielles d'une langue internationale, il semble bien que l'Esperanto ait eu raison de conserver un accusatif, ainsi que le démontrent les ambiguïtés et les raideurs de style qu'on découvre dans les langues artificielles qui ont voulu s'en priver.

BIBLIOGRAFIO

- AYMONIER, CAMILLE, 1913: Pri Esperanto. El franca lingvo esperantigis R. FERTER. — Esperantista Centra Oficejo, Paris.
- BALLY CHARLES, 1946: Linguistique française et linguistique générale. — Franck, Bern.
- COLLINDER, BJÖRN, 1938: La problemo de lingvo internacia. — J. Muusses, Purmerend, Nederlando.
- COLLINSON, W. E., 1924: Esperanto and its critics. — London.

- COUTURAT, L. & LEAU, L., 1903: Histoire de la Langue Universelle. — Paris.
- MANDERS, W. J. A., 1947: Vijf Kunsttalen. — J. Muusses, Purmerend, Nederlando.
- PIGAL, E., 1930: Occidental, die Weltsprache. — Stuttgart.
- VENDRYES, J., 1921: Le Langage. — Paris.
- WARINGHIEN, GASTON, 1938: Pra-Esperanto II — en »Lingvo-Libro« — Literatura Mondo, Budapest.
- 1946: A B C d'Esperanto, à l'usage de ceux qui aiment les lettres. — Esperantista Centra Librejo, Paris.
- 1948: Esperanto antaŭ la tribunalo. — Literatura Mondo 3. periodo, 2: 35—43, 73—78.
- 1948: Leteroj de Zamenhof, kun komentado. I. — SAT, Paris.
- 1949: Leteroj de Zamenhof, kun komentado. II. — SAT, Paris.
- ZAMENHOF, L. L., 1907: Pri reformoj en Esperanto. Artikoloj reprezentaj de Dr. J. JAVAL. — P. Brodard, Coulommiers, Francio.

Daŭnigo en "Lingvo kaj Vivo" 1959

A Comparison between Word Formation in Esperanto and English

by

Dr. OLAV REIERSØL and R. C. MARBLE

PART ONE

An experimental investigation concerning the learning of synthetic languages (Esperanto and Ido) compared to the learning of national languages was conducted at Teachers' College, Columbia University, New York, during the years from 1925 to 1931. This study was directed by Professor E. L. THORNDIKE, and made in cooperation with the International Auxiliary Language Association (IALA). A summary of the results was published in 1933 (THORNDIKE et al., 1933). From this summary we quote: "On the whole, with expenditures of from ten to a hundred hours, the achievement in the synthetic language will probably be from five to fifteen times that in a natural language, according to the difficulty of the latter."

Other investigations have been done to compare the qualities of Esperanto and other languages (DREZEN 1931, p. 178, JOSSINET 1948). We shall quote from the book of DREZEN referred to:

"In some countries investigations were made by special commissions (among others in the year 1913, directed by TRISTAN BERNARD). In these investigations a text selected in advance was translated into several languages, one of which was Esperanto, and afterwards the texts were retranslated into the language of the original, by people who did not know the original text. By these experiments it was found that Esperanto undoubtedly is superior to the national languages in flexibility, diversity of nuances, and precision in translation."

If we are asked for the reasons why Esperanto is so much easier and yet, in certain respects, superior to the national

a/ languages, we may mention first of all the very simple grammar of Esperanto. However, it has often been said that English also has a quite uncomplicated grammar, but a person making this statement thinks of grammar in a narrow sense, i. e., he thinks of grammatical inflections only, although even the English grammatical inflections are more complex than those of Esperanto. The declension of the English noun, nevertheless, is quite simple in comparison to the inflectional changes to which the German or Russian noun is subject. The conjugation of the English verb presents little difficulty to the student who has encountered the comparatively involved conjugations current in the Romance languages. Also, the amount of study necessary to learn the irregular plurals of English nouns is only a small percentage of the whole time needed to learn English.

If we consider grammar in a wider sense and include, for instance, the peculiarities of its syntax, the derivation of words by means of prefixes and suffixes, then English grammar can only be regarded as extremely complicated. In regard to word-formation Esperanto is characterized by a regular system of derivation by means of affixes, each of which corresponds to a certain logical category.

National languages in many instances use different word roots to express a change in meaning relating to the original concept, whereas Esperanto regularly adheres to the original root throughout such changes. Thus we have:

English	German	French	Esperanto
ox	Ochs	boeuf	bovo
cow	Kuh	vache	bovino
cut	schneiden	trancher	tranĉi
knife	Messer	couteau	tranĉilo

Statistically, such words would probably form only a small part of all derived words in a given language, even in English where the incidence of similar formations is no doubt greater because of the basic intermixture of Teutonic and Romance roots in the historical formation of modern English. In many cases English uses a word of Teutonic origin to express the

noun concept, and another, dissimilar Romance root to denote the adjectival function of the identical concept. In like situations most other languages, including Esperanto, use several words, one of which is a derivative of the other. For example:

English	German	French	Esperanto
end	Ende	fin	fino
final	endlich	final	fina
	Ende-		
hell	Hölle	enfer	infero
infernal	höllisch	infernal	infera
	Höllen-		
lung	Lunge	poumon	pulmo
pulmonary	Lungen-	pulmonaire	pulma

In most cases a derived word in Esperanto will be represented in English either by a more or less regularly derived word, or by a phrase consisting of two or more words (this paraphrastic necessity is frequently encountered in translating from Esperanto into English).

The importance of a regular grammar in general, and of a regular word formation in particular varies greatly, depending of course on whether the student wishes to confine his effort to learning only to read the language under study, or whether in addition he desires to acquire the ability to write or speak it. Let us compare the following examples:

English		Esperanto	
Noun	Adjective	Noun	Adjective
nation	national	nacio	nacia
fraction	fractional	frakcio	frakcia
tradition	traditional	tradicio	tradicia
emotion	emotional	emocio	emocia
reaction	reactionary	reakcio	reakcia
evolution	evolutionary	evolucio	evolucia
fiction	fictitious	fikcio	fikcia
sedition	seditionous	ribelo	ribela

English		Esperanto	
corporation	corporative	korporacio	korporacia
induction	inductive	indukto	indukta

The meaning, or one of the meanings, of the suffix in each of the derivatives in the above list may be rendered by "pertaining to". Each of the suffixes *-al*, *-ary*, *-ous*, and *-ive* also have other meanings.¹⁾ Therefore, if one of the English derivatives in the above list is given in isolation, we cannot be certain of its meaning even if we are familiar with the word from which it is derived, and know all the meanings of the suffix. If, however, the derivative is met in context, the meaning in that particular case will usually be clear; accordingly such derivatives add almost nothing to the time it takes to learn to *read* English. Conversely, if we wish to write or speak English, we must have learned each derivative in advance in order to be able to use it. If we, for example, need a word with the meaning "pertaining to emotion" and have not met with an adjective of that meaning before, we cannot know whether the word should be *emotional*, *emotionary*, *emotitious*, *emotious*, *emotive*²⁾, or some other form; or, indeed, whether there exists in English a single word for the concept. The importance of the regular word formation in Esperanto is much greater, therefore, in learning to speak and write the language than it is in learning to read it only. A person who has only read Esperanto, but not used it in speaking and writing, has not had a full experience of the advantages of Esperanto.

In Esperanto both suffixes and prefixes, and the endings *-o*, *-a*, *-i*, *-e*, serve the word derivation. The terminations *-a* and *-i* correspond to logical categories which are much broader than those expressed by the prefixes and suffixes. In the following paragraphs we shall examine one of these broad logical categories expressed by the Esperanto ending *-a*, and two of the nar-

¹⁾ A survey of the different meanings of each suffix has been given by THORNDIKE 1941.

²⁾ In point of fact psychologists use the term *emotive* to avoid some of the implications of *emotional*.

rower logical categories, Esperanto *-ema* and *-igi*, in comparison to English. In particular there are many English suffixes corresponding to the ending *-a* in Esperanto. It would be possible to subdivide the logical category expressed by the Esperanto ending *-a* into less comprehensive categories, and, in this way, we might reduce the number of English suffixes which correspond to each category. Furthermore, we might make a subdivision according to the form of the primitive word, for instance we might classify as a special group those English words which end in *-tion*. By this means we might reduce still more the number of suffixes in each group. A complicated set of rules for the use of each suffix could conceivably be found, but these rules would be subject to a great number of exceptions. To date no investigation of this kind has been published, perhaps because by learning such rules and their exceptions we would not gain much over a separate learning of each derivative. For persons knowing a Romance language we might devise another set of rules and exceptions, because many of the suffixes in English correspond to similar suffixes in the Romance languages. For a Frenchman, as an example, we might work out a series of rules with exceptions, which would enable him to construct the English derivative from its French counterpart. But many suffixes in English are of Teutonic origin, and even in words formed with Romance suffixes the correspondence is only partial.

In Esperanto each affix may be applied freely to form derivatives, the only limitation being that the words so fashioned must make sense logically. Now Esperanto utilizes some suffixes comprising logical categories which are only rarely expressed by affixes in the national languages. A conspicuous example is the Esperanto suffix *-eg* which denotes augmentation, or intensity of degree. In English and most European languages there is no extensively used affix expressing this conceptual variation. It is interesting to note, however, that colloquial Norwegian and Danish has a prefix *kjempe-* and *kæmpe-*, respectively which is applied with the same force as the Esperanto suffix *-eg*. The prefix *kjempe-* may be used rather extensively with adjectives and

nouns, although not so freely as the Esperanto *-eg*. In colloquial Swedish there is a prefix *jätte-* which is used in the same manner and with the same meaning.

REFERENCES

- DREZEN, E., 1931: *Historio de la Mondolingvo*. Leipzig.
JOSSINET, ROLAND, 1948: [artikoleto en] *Heroldo de Esperanto* 24 (n-ro 1087): 3.
THORNDIKE, E. L., 1941: *The Teaching of English Suffixes*. New York.
THORNDIKE, E. L. et al., 1933: *Language Learning*. Division of Psychology, Teachers College, Columbia University, New York.

Hispanidaj neologismoj en Esperanto

De D-ro J. RÉGULO PÉREZ*)

NEERGAARD, en sia traktaĵo »La esperantologio kaj ties disciplinoj«, metis inter ĉi tiujn la etimologion aŭ vorthistorion, t. e. la branĉon de la esperantologio, kiu science studas la devenon de la esperantaj vortoj. En esperanto ne estas facile verki pri la temo, ĉar apenaŭ ekzistas tradicio kaj, ĝenerale, oni ne scias ĝis kioma grado iri malantaŭen en la historio de la vortoj. Pri tiu temo aperis sagaca artikolo de VERDANO, kiu iom montras la vojon sekveblan.

Sajnas al mi, ke oni devas montri la lingvon, el kiu esperanto prenis la vorton kaj klarigi iom detale, se necese, kiel tiu estiĝis en la koncerna lingvo nacia, se temus pri tia, aŭ kiel kreiĝis la internacia formo, kiam temus pri artefarita termino. Vortoj havas fosilian historion kaj al kono de ilia historio ŝuldiĝas multfoje trafa uzo de esprimoj kaj formado de bona supernacia esperantista stilo. Certe, se oni bone scias, kiuj estis la helenaj literaturaj ĉefherooj *Μέντωρ* kaj *Νέστορ* kaj la biografion de la latino *Maecenas*, pli facile kaj nete iĝos klaraj la signifoj de *mentoro* kaj de ties neologisma paralelo *nestoro*, same kiel tiu de la zamenhofa *mecenato*.

Dum legado de esperantaĵoj, mi trovis kelkajn vortojn, kiuj elvokis en mia spirito siajn hispanajn praulojn, kvankam preskaŭ neniam ili atingis la esperantistan arenon rekte el Hispanio. Tial ke ĝis nun mankis en Esperantio elstaraj hispanaj figuroj¹⁾, kiuj estus influintaj la esperantistan literaturon en

*) Docento pri klasikaj lingvoj ĉe la Universitato de La Laguna, Kanariaj Insuloj.

¹⁾ Mi miras pri la preskaŭ plena nekono de la hispana lingvo internaciskale. La libro de JEF LAST, *La hispana tragedio*, tradukita de DEGENKAMP, svarmas je preseraroj en la hispanlingvaj vortoj; en »Literatura Mondo«, »Esperanto«, Jarlibro de UEA, »Heroldo de Esperanto«, ktp, kiam temas pri hispanlingvaj vortoj, nur tre malofte ĝustas la ortografio. La franca estas pli malfacila kaj ĝin oni vidas pli korekte skribitan.

simila grado, kiel ekzemple la rusaj, francaj, anglaj, germanaj kaj eĉ japanaj samideanoj, estiĝis al tiuj vortoj ŝanĝiĝema signifo kaj ĉefe anarĥia ortografio. La sekvontaj notoj celas montri la vidmanieron de hispanlingvulo kaj proponi iom da signifa kaj etimologia-ortografia klarigo — nun, kiam ankoraŭ la plimulto de tiuj terminoj nur estas neologismoj. Ĉar eble iam povus okazi oficialigo de malpli taŭga formo, kiel okazis al la vorto *toreadoro*, pri kiu mi parolos poste.

Ekspliko pri la aranĝo

Unue, ĝenerale, mi citos, sub a), *ekzemplon* de la fakta uzo de la koncerna vorto. — Poste, sub b), venas *klarigo* de la signifo en la originala lingvo, kun ekspliko de la hispana etimologio, kiam necese. Ĉe la unuafoja cito de hispanlingva vorto, kiu respondas al numerita en artikolo, mi donas en rektaj krampoj ĝian fonetikan egalvaloron per la fonetika transskribo de Int. Fonetika Asocio. — Sekvas, sub c), *kritiko*, kiam tiu montriĝas necesa. — Fine, sub ĉ), mi redonas la vorton kun plena *difino* kaj enkrampa resuma etimologio. — La pritraktataj vortoj estas ĉiam skribitaj per minuskloj kaj nominative singulare.

I. eldorado

- a) Miaj strofoj volus vindi sveltajn formojn de Venuso,
La plastikon de statuoj de l' antikva kulta bel',
Bronzan nudon de la landoj, simbolitaj per lotuso,
Fantazian *eldoradon* de la ravo kaj fabel'.

(HOHLOV, p. 19.)

b) *eldorado* estas alĝluiĝo de la hispanaj vortoj *El Dorado* [*eldo|raĉo*], laŭvorte: »la orkolorulo«. Tiun esprimon famigis unu el la plej memorindaj el la hispanaj esploroj en Sudameriko, kaj certe la plej eksterordinara inter tiom da gravaj mirvojaĝoj, kiuj okazis por trovi tiun mirlandon. Ĉar ja temas pri »lando«, pri la *Reĝlando de la Orkolora Princo*.

La famo komenciĝis post la renkonto de Belalcázar kun Quesada kaj Fredman, sur la altplataĵo de Bogotá (Kolombio), en 1538. Poste kreskigis tiun famon la ekspedicio de F. von Hutten, kiu, laŭdire, preskaŭ atingis la *Imperion de Omagŭa*, en Venezuelo, alian obsedolandon. Ŝajne la legendo estiĝis el tio,

ke ekzistis princo aŭ ĉefsacerdoto de iuj indianaj gentoj, kiu kutimis orkolorigi, per pulverigita oro, siajn brakojn kaj manojn antaŭ religiaj servoj. Al tio aldoniĝis la faktaj mirindaj riĉaĵoj je metaloj kaj juvelŝtonoj de la regiono nun nomata Minas Geraes, pri kiuj parolis multfoje brazilaj indianoj. La fantazio de aventuristoj lokigis la »landon« de la Orkolora Princo ie en Sudameriko, ĉiam en neesplorita regiono. La ekspedicio de Francisco de Orellana, kiu, la unua, en 1540—41, esplornavigis, ĝis ĝia almarigo, la riveron Amazonas, obsedis pli kaj pli la serĉantojn de novaj imperioj, submetotaj por akiro de famo kaj gloro. Ĉar la *eldoradistoj*, la kavaliroj, kiuj serĉis la »landon« de la Orkolorulo, ne estis malsataj aventuristoj, sed preskaŭ ĉiam grandanimaj agviroj. — Nu, en 1558 la perua vicreĝo Cañeta organizis novan ekspedicion. Ĝin komandis Pedro de Ursúa. Tiu ekspedicio estis la plej sanga, romantika, sovaĝa kaj terura el ĉiuj konkeraj eventoj en Ameriko. La leŭtenanto de Ursúa, Lope de Aguirre, murdis la ĉefon kaj sin proklamis anstataŭe. Poste li murdis ĉiujn suspektindulojn, inter ili la sinjorinon doña Inés de Atienza, »la plej bela damo el Peruo«. Dume Aguirre sin ekshispanigis, kaj kun siaj 300 arkebuzistoj deklaris la militon al la hispana reĝo Felipe II. La krimoj de Aguirre daŭris. Multaj forlasis lin. Li antaŭvidis proksima sian finon. Tiam li murdis ankaŭ sian filinon doña Elvira, »por ke ŝi ne iĝu matraco por kanajloj kaj senhontuloj«. Fine unu el liaj arkebuzistoj mortigis lin en Venezuelo, post plena esplornavigado de la rivero Amazonas kaj unuafoja esploro de la amerika marbordo ĝis la rivero Orinoco. — Oni plu serĉis la eldoradon, ĝis la XVIIIa jarcento, ĉar tiu »lando« ŝajne ŝatis sin kaŝi ĉiam pli malproksimen kaj amis sin nutri per animoj de herooj . . .

c) La hispana nomo *Reino del Príncipe Dorado*, simpligita je *El Dorado*, iĝis internacia, kaj sub tiu senŝanĝa formo troviĝas en anglaj, francaj, hispanaj, ktp. vortaroj. Algluita ĝi eniris esperanton, sed nur kun la signifo 'fiktiva, fabelriĉa lando', t. e., ĝi alvenis sena de sia historia signifo. Tial mi klarigis ĝin kaj ĉar tio donas pli kernan sentimenton al ĝia poezia valoro. Ŝajnas al mi, ke la vorto *eldorado* ne estas necesa, escepte en okazoj de poezio.

ĉ) *Eldorado*. Fiktiva lando, abunde riĉa je oro. Fabel-, mir-, ravlando. [El la hispana *El Dorado* = 'la orkolorulo', mallongigo de *Reino del Principe Dorado* = 'Reĝlando de la Orkolora Princo', »lando« de la XVI-jarcenta sudamerika mirgeografio.]

2. donhuano [*Don Juano, Donjuano*]

a) Kaj ĉi tie ni trovas la solan antipatian trajton de tiu ĉi pasiva fabelheroa *Don Juano*: al la pasiaj amkonfesoj li ĉiam respondas per moralaj instruoj (TOTSCHÉ, p. 23).

Iama brila *Donjuano*,
La korkonkera kavalir',
Per siaj venkoj de l' tirano
Humile pagis per sopir'.

(HOHLOV, p. 22.)

b) *Don Juan* [*dop|xwan*] estas la nomo de fiktiva heroo literatura, kiu fontas en la hispana literaturo el la verko de TIRSO DE MOLINA »El burlador de Sevilla« [La sevilja delogisto], aperinta en 1630. Tiu verko koncipita de religiulo por ilustro de teologia disputo, transiris la hispanajn landlimojn, sed sena de sia religia karaktero. En Italio, Francio, Germanio kaj Anglio tiu literatura heroo famiĝis en la beletro kaj la muziko kaj originis eminentajn artajn verkojn, pli famajn ol la pratipa. El tiuj fremdaj kreaĵoj ĉerpis la hispana aŭtoro JOSÉ DE ZORRILLA sian *Don Juan Tenorio*, aperintan en 1844. Tie ĉi la heroo estas jam la tipa amaĵemulo, brila kaj senkreda fierulo, diboĉulo kaj delogisto.

c) Ĉi tiu vorto, kiel la sekvonta *donkiĥoto*, metas antaŭ nin la problemon pri la esperantigo de hispanaj vortoj. Du konataj verkistoj, laŭ la supraj ekzemploj, ortografiis tiun literaturan terminon malsame. TOTSCHÉ ŝajne sekvas la formojn internaciajn, laŭ la modeloj romid- kaj ĝermanlingvaj; HOHLOV atentis la elparolon, ŝajne laŭ tiuj samaj lingvoj. Sed hisp. *j* = esp. *li*. Ĉi-okaze oni povus sekvi la tendencon, kiu preferas grafikismon en la alprenado de internaciaj vortoj fare de esperanto. Tamen ne ĉiam tiu vojo estas ebla, ekzemple kiam temas pri lite-

roj, kiujn ne posedas la esperanta aboco²⁾. Ĉar ne regas interkonsento, mi preferas ĉi-okaze fonetikismon, ĉiam, kompreneble, laŭ la ebloj kaj spirito de esperanto. Certe WÜSTER³⁾, kiel HOHLÖV, ortografiis *donjuano*; sed ĝuste tial ke necesas aliigo de la ortografio (fr. *j* je esp. *j*), por redono de la franca prononco, mi kredas, ke estus pli pravigebla la aliigo konforma al la etimologia prononco. Ja la neinterkonformeco prononca kaj grafika de *ĥ* kaj *j* ne gravus, post adopto de la etimologia formo. (Pri la pravigo rilate konservon kaj algluon de la vorto *don* al *ĥuano*, vidu sube numeron 3. *donkiĥoto*.)

ĉ) *donĥuano*. Literatura tipo, kiu reprezentas viron amajeman, fieran, brilan, senkredan, diboĉan, delogistan, jen posedantan ĉiujn tiujn ecojn, jen sole unun aŭ plurajn. [El la hispana *Don Juan*, propra nomo de literatura ĉefhero de Tirso de Molina.]

3. *donkiĥoto* [*Don Kiĥoto*, *don Kiĥote*]

a) b) La heroon de la ĉefverko de MIGUEL DE CERVANTES SAAVEDRA *Don Quijote* [*doŝkiĥote*] (en la unuaj hispanaj eldonoj ortografiitan *Don Quixote*) oni citis multfoje kaj multloke en la esperantista literaturo. Krom la konsekvenca maniero, kiun uzas STELLAN ENGHOLM, t. e. konservo de la hispana prononco kun esperantaj literoj *don Kiĥote*, nur ĉe BAGHY mi vidis trafan uzon, laŭ mia sento. La hispana eksakademiano V. INGLADA ORS skribis *Kiĥoto* por nomi la verkon de Cervantes kaj *don Kiĥoto* por nomi ties heroon. Ŝajne li estis influata de la hispana uzo, kiu metas *El Quijote*, kiam temas pri la verko, kaj *Don Quijote*, kiam temas pri la heroo. E. LANTI uzis *Don Kiĥoto*⁴⁾.

²⁾ En »Literatura Mondo«, 1948, p. 158, 2a kol., mi legis *Don Juan-oj*, apud *Casanova-j*. Ĉi-okaze temas pri konservo de la origina ortografio, kio estas konsekvenca, sed ne ĉiam oportuna cele al la dezirata komunlingva unuformismo.

³⁾ La citaĵoj al la vortaro de WÜSTER mi dankas al d-ro PAUL NEERGAARD, ĉar tiu verko ne estas konsultebla en Kanarioj. Al d-ro NEERGAARD mi ankaŭ dankas sagacajn konsilojn kaj indikojn por pliperfektigo kaj ĝustigo de la manuskripto.

⁴⁾ En Leteroj de E. Lanti la presita teksto metas *Don Hiĉoto*, sed aldona folio korektas *Don Kiĥoto*.

kaj WARINGHIEN (1948, p. 7), adverban formon: *donkiĥote*. WÜSTER registras *donkiŝoto/Don Kiĥoto* kaj la kunmetaĵojn *donkiŝotaĵo* (germ. *Donquichottiade* [< fr.]), *donkiŝoteco* (germ. *Donquichotterie* [< fr.]). Mi legis *Don-Kiĥoto* kaj foje mi mem skribis *Don Kiĥoto* por la heroo kaj »Don Kiĥoto« por la verko (RÉGULO PÉREZ). Ekzistas aliaj variantoj, kiaj *Don Kihoto*, *Don Kihotaĵoj*, k. t. p., sed malpli taŭgaj.

c) Tiu ĥaoso ŝuldiĝas al du kaŭzoj: al la maniero pri transskribo de la hispanaj literoj, kiuj ne troviĝas en esperanto, kaj al la modo kiel trakti la vorton *don*. Pri la problemo de la transskribo ne povas esti diskuto: temas pri la hisp. *qu* = esp. *k*; kaj tial ke jam oni estas devigata aliigi la komencon, oni konsekvence devas aliigi *j* je *ĥ*, laŭ la fakta elparolo. Nu, ĉar en esperanto ja temas ne pri la rolanto mem de la cervantesa ĉefverko, sed pri universala komunlingva homtipo, ne estas kaŭzo por ne esperantigi ĝian finaĵon *e* je *o*. Alia pravigo de la transskribo troviĝas en la malsama ortografio uzata de diversaj lingvoj, ekzemple angle *Don Quixote*, bulgare *Don-Kijot*, france *Don Quichotte*, germane *Don Quixote/Don Quijote*, greke *Δον Κιχωτης/O Δον Κιχωτες*, hebree *דון קישוט*, hispane *Don Quixote/Don Quijote*, itale *Don Chisciotte*, jide *דון קיכאט*, katalune *Don Quixot*, pole *Don Kiszot/Don Kichot*, portugale *Don Quixote/Don Quichote*, provenze *Don Quichote*, ruse *Дон-Кихот/Дон Кихот*, turke *Don Kisot*, k. t. p., kio pruvas, ke malsamas ankaŭ la prononco.

Sed alia estas la starpunkto, kiam temas pri la vorteto *don*. *don* estas hispana titolo, kiu venas de lat. *dominu(m)*. (Hispane estas korekte ortografii ĝin jen per majusklo *Don*, jen per minusklo *don*.) La responda ingenra formo *domina(m)* donis france *dame*, hispane *doña*, itale *donna*, kiu troviĝas en *madono* (<it. *madonna* = »mia sinjorino«), portugale *donha*, ktp. Tiun titolon unue uzis nur personoj, al kiuj reĝo honorigis per ĝi. Kiam vivis kaj verkis Cervantes, la titolon *don* uzis nur nobeloj kaj ties idoj. (Hodiaŭ ĝin uzas ĉiuj personoj, kiel france *monsieur*, angle *mister*, germane *Herr*, ktp.). La plena titolo de la cervantesa verko estas *El ingenioso hidalgo don Quijote de la Mancha*. La vorto *hidalgo* laŭetimologie estas »nobelido«; al ĉiu

hidalgo do endis *don*⁵⁾). Eble la internacia uzo, kiel montras la ĉefaj kulturlingvoj, pravigus, kiam temas pri la universala komunlingva senco, ke oni alprenu la formon sen *don* ankaŭ en esperanto. Sed, kiel evidentiĝas el la supraj titoloj, la heroo estas ĉiam *Don Kihoto* kaj ne *Kihoto* sola. Neniu, mi kredas, nomus la cervantesan heroon sen la titolo *don*; almenaŭ mi povas tion aserti pri la hispanparolantaj popoloj. Kaj tial ke tiu titolo ekster Hispanio diras nenion al la uzantoj, por multaj logike ĝi estas konsista parto el la heroa nomo. Prave do BAGHY uzis kunmetitan formon en la titolo *Verdaj donkiĥotoj*. Tio estas la plej logika kaj konsekvenca. Krome, jam france oni trovas *donquichottisme* kaj la unuaj anglaj eldonoj portis *Don-Quixote*, kun ligstreko. — Same ĉe *don Juan*. Cetere, por loknomoj, hispanlingve jam oni trovas *Donjuán* < *Don Juan*, *Donjimeno* < *Don Jimeno*, ktp.⁶⁾), kaj la vorto *donjuanismo* estas tre ofte uzata de la nuntempa hispanlingva literaturo. Mi konsilus do *donkiĥoto*, *donkiĥota*, *donkiĥote*, *donkiĥotismo*, *donkiĥotaĵo* ktp. kaj paralele *donĥuano*, *donĥuana*, *donĥuaneca*, *donĥuanismo*, ktp., kvankam por ĉi-lastaj, el internaciisma kaj grafikisma vidpunktoj, eble estus pli komprenebla nuntémpe, ĉe kleruloj, *donjuano* kaj prefere *Don Juano*, kiel ortografiis TOTSCHÉ. Sed tiujn formojn mi rigardas paralelaj al *mecenato*, *mentoro*, *nestoro*, kiuj al la plimulto de la esperantista popolo ne elvokas la originajn *Maecenas*, *Μέκωνας* kaj *Νέστωρ*. Tiel ili iĝus logikaj akiraĵoj de esperanto, sendependaj de la kutimoj de la ĉefaj naciaj lingvoj. Kaj kiam temus pri la cervantesa heroo mem, rol-

⁵⁾ V. INGLADA ORS proponis uzi la neologismon *hidalgo* por la hispana *hidalgo*, ĉar *civitano*, *junkro*, *kavaliro*, *nobelido*, ktp. ne donas traŭtaŭgan tradukon de tiu hispana vorto. *Hidalgo* = 'ido de sangnobelo. Homo nobla kaj grandanima'.

⁶⁾ *Donjuán*, loknomo de du vilaĝoj en la grandantila respubliko Sandomingo. *Donjimeno*, loknomo de komunumo en la hispana provinco *Avila*. — KALOCSAY, en »Literatura Mondo«, 1947, 158, 2a kol. nomas *Sandomingo* unun el la du ŝtatoj de la grandantila *Santo Domingo*, evidente laŭ *Sanmarino*. Hispane oni nomas *Santo Domingo* la insulon kaj *República Dominicana* la respondan el la du insulaj ŝtatoj. La alia saminsula ŝtato estas *Haitio*. Mi dividas la starpunkton de KALOCSAY, ĉar parole multfoje *Santo Domingo* kaj *República Dominicana* estas sinonimoj).

anta en lia verko, tiam oni povus pravigi *don Kihote*, *don Quijote*, *Don Kihoto*, *Don-Kihoto*, ktp. laŭkonvene aŭ laŭguste.

ĉ) *donkihoto*. Viziulo, kiu celas belajn, sed neebajn idealojn. Homo, por kiu materiaj aĵoj estas senvaloraj kaj gravas nur idealoj de honoro, devo, fidelo, ktp. Homo, kiu prizorgas restarigon de justo. [El la hispana *Don Quijote*, nomo de la ĉefheroo de la samnoma verko de Miguel de Cervantes.]

4. gverilo

- a) Sur via ter' mi vidis la invadon,
Arezzo, vidis trupojn de *gveriloj*
fari turnirojn, kuri lancrompadon.

(KALOCsAY 1933, Infero, dudekdua kanto 4—6, p. 171.)

b) *gverilo* estas tipa vorto el hispana deveno. La hispana formo *guerrilla* [ge'rriĵa] eniris senŝanĝa aliajn lingvojn, ekzemple la nederlandan: *guerrilla-oorlog* (La Progresanto). Tiu vorto estas diminutivo de la substantivo *guerra* = »milito«, kiu venas de la ĝermana *werra* = »tumulto« kaj kiun postlasis en Hispanio la gotoj invadintaj la iberian duoninsulon komence de la Mezepoko. Tiu diminutivo estas farita per la sufikso *-illa* < lat. *-ella(m)*, kiu rolas hispanlingve kiel *-et-* en esperanto. Do laŭetimologie *gverilo* < *guerrilla* = »militeto«.

c) Mi ne vidas kaŭzon por konservi la *u* de *gu* je la *v* de *gv*, ĉar ja tiu litero ne estas prononcata hispane. *gerilo*, kiun jam registris WÜSTER, sufiĉus, kaj krome tiel ĝi estus pli facile prononcebla. Ŝajnas al mi bona simpligo de hisp. *ll* je esp. *l*. (Pri tiu punkto, vidu sube, numeron 5. *kaŭdilo*). La terminon mi ne kredas nepre necesa: *surpriz-*, *embusk-*, *partizanmilito* sufiĉus, laŭokaze. Sed *p o r gerilo* pledas ĝia vasta internacieco.

ĉ) *g(v)erilo*. Araro da civiluloj, ĝenerale ne multnombra, kiu militas sub komando de privata ĉefo, ĉu en kontakto kun la regula armeo, ĉu memstare. Ĝia tasko estas ĝeni la malamikon per embuskoj kaj surprizatakoj. [El la hispana *guerrilla*, samsignifa.]

5. kaŭdilo

- a) Ni laŭdu lin, *kaŭdilon* Franco,
venkinton super la hispanoj . . .

Kaŭdilo!, ĉesos ĉi sangbanoj,
kaj ĉi laŭfajfa farandolo . . .

(KALOCSAY 1948.)

b) *kaŭdilo* mi nur legis en la citita poemo de KALOCSAY. Kred-eble ĝi ne fariĝos ĝenerala. La hispana vorto *caudillo* [kau^hdi^hlo], same kiel siaj samoriginaj kaj samsignifaj *cabdillo kaj cabdie-lllo*, estas tre malnova en la hispana lingvo. Ĝi venas de la popol-latina *capitellu(m)*, diminutivo de *caput* = 'kapo', kaj jam dum la XIa jarcento ĝi signifis 'gvidanto de milituloj'. Hodiaŭ ĝi estas samsignifa kiel la germana *Führer*, itala *duce*, rumana *conducator* kaj aliaj naciaj terminoj, naskitaj imite al la faŝista *duce*. El tiu latina diminutiva sufikso *-ellu(m)* eliris la hispana *-illo*, kies ingenra formo ni jam vidis ĉe *guerrilla*.

c) Mi ne vidas kaŭzon por plua uzo de la vorto *kaŭdilo* en esperanto. Ja KALOCSAY (1934) mem, en sia traduko de la *Vivo de Arnaldo* de BENITO MUSSOLINI lasis la vorton *duce* senŝanĝa, itale. Foje oni trovas *furero* por *Führer*, ekzemple en lastatempa »Heroldo de Esperanto«. Sed tio, laŭ mia opinio, ankaŭ ne estas necesa. Kiel nenecesus *premiero* por nomi la anglan ministro-prezidanton.

Pri unu afero mi plene konsentas kun KALOCSAY: pri la transskribo de la hispana *ll* per *l* en esperanton. La hispana *ll*, fonetike *h*, estas sono, kiu ekzistas en multaj lingvoj, eĉ en esperanto. Ĝi estas la malnova franca »*l mouillé*« (skribata *ill*), la itala *gli*, kataluna *ll* (antaŭe *yl*), portugala *lh*, ktp. Kelkaj slavaj lingvoj ĝin signas per *lj*, same kiel esperanto. La Plena Gramatiko de KALOCSAY & WARINGHIEN donas *nj* kiel grafikaĵon de la koncerna esperanta palata naza voĉa fonemo (fonetike *ñ*, france *gn*, hispane *ñ*, itale *gn*, katalune *ny*, portugale *nh*, ktp). Tiu klarigo estas plene konsekvenca, ĉar tiu fonemo ekzistas en esperanto. Sed tiu Gramatiko ne klarigis la iel paralelan *lj*, kiu estas palata latera voĉa fonemo kaj troviĝas en la Fundamento

mem, ĉu en radikoj (*buljono*), ĉu en kunmetoj (*miljaroj*), kaj poste en multaj aliaj vortoj, ĉu ekzemple simplaj: *kariljono*, *kotiljono*, *marseljezo*, *postiljono*, ktp, ĉu kunmetaj: *maljuna*, *maljungi*, *maljusta*, ktp.

Nekonsekvenco en la transskribo de tiu fonemo okazigis malsamtipajn vortojn en la esperantista literaturo, kiaj *orgojlo* (<fr. *orgueil*), *brajlo* (<fr. *Braille*), *marseljezo* (<fr. *Marseillaise*), ktp. kontraŭ *batalo* (kp fr. *bataille*, hisp. *batalla*, it. *bataglia*, port. *batalha*), *mitralo*⁷⁾ (kp fr. *mitraille*, hisp. *metralla*, it. *mitraglia*, port. *metralha*), *medalo* (kp fr. *médaille*, hisp. *medalla*, it. *medaglia*, port. *medalha*), ktp. Devus esti interkonsento. Kvankam principe mi estas fonetikismema, tamen mi preferas *orgolo*, *mitralo*, *marselezo*, *gerilo*, *kaŭdilo*, *bralo*, ktp. Kaj, kiam oni preferas fonetikismon, tiam konsekvence estu *orgoljo*, *mitraljo*, *marseljezo*, *kaŭdiljo*, *geriljo*, *braljo*, *kariljono*, ktp. Same mi preferas la formon *soveto*, kiun lastatempe multaj ortografias *sovjeto*.

ĉ) *kaŭdilo*. Gvidanto, hispana lingva-socia ekvivalento de la germana *Führer*, itala *duce*, rumana *conducator*. [El la hispana *caudillo* = 'ĉefo, gvidanto de milituloj'.]

6. toreadoro

a) Ĉi tiu vorto estas oficiala kaj ne necesigas ekzemplan klarigon. Tamen rilate al la klarigo en la Plena Vortaro de SAT:

⁷⁾ Mi legis la vorton *mitralo* en DEGENKAMP: *Jef Last. La hispana tragedio*, ekz. sur p. 92: »Nur mi scias, ke ĉiumomente la *mitralo* en Las Rozas povas komenci sian bojpaŝadon kaj ke la folioj de l' arbustoj ne prezentas ŝirmon kontraŭ la kugloj«. Ĉe la fina vortklariga listo DEGENKAMP metas: *mitralo* = »maŝinpafilo similanta malgrandan kanonon«. Denove mi legis ĝin en versaĵo de RETO ROSSETTI:

Lunde kunsidis ni teatrohale
kaj aŭdis, ke Lapenna jam *mitrale*
vortŝutas.

En ambaŭ okazoj ŝajne temas pri speco de milita maŝino, kaj konkrete ĉe DEGENKAMP ŝajne ĝi respondas al la hispana *mortero* = »bombkanono«. Antaŭe mi legis kelkfoje tiun vorton, sed kun la signifo de la fr. *mitraille* = »fragmentaj grenadfer-aĵoj«, senco evoluinta el la malnovaj feraĵoj, per kiuj oni ŝtopis kanonojn, krom per eksplodigilo. Necesus interkonsenti pri la signifo. Mi preferus la internacian, respondan al fr. *mitraille*, hisp. *metralla*, it. *mitraglia*, port. *metralha*, ktp.

»homo batalanta kontraŭ la bovoj en la hispanaj bovaj kurludoj«, mi ne tute konsentas: en Meksikio kaj aliaj latinamerikaj landoj ankaŭ okazas bovaj kurludoj, foje eĉ pli paradaj, spektaklecaj kaj pasiaj, ol en Hispanio.

b) c) Tiu vorto ŝajne venas de la hispana *toreador* [*tored^ldor*] ankaŭ foje prononcata [*torja^ldor*], kiun mi neniam legis aŭ aŭdis kaj konas nur el vortaroj. Ĝi devas esti tre malofta en hispanlingva literaturo. La nun ekskluzive uzata estas *torero* [*to^lrero*] lat. *taur-* + suf. *-ariu(m)*. Ambaŭ hispanaj vortoj signifas »kurludisto de virbovoj ĉe bovmortigaj festoj«. Sed ĉar en esperanto troviĝas la neologismo *taŭro* < lat. *tauru(m)* »virbovo« (neniam oni kurludigas bovinojn aŭ oksojn [o. = kastrita plugbovo]), jam registrita en la Plena Vortaro kaj uzita literature⁸⁾, estus pli taŭga kaj trafa la vorto *taŭristo* < *taŭr(lud)isto*, tute identa laŭkonsiste kaj laŭsignife al la komunhispana *torero*. Ĝi krome estas analoga al la proponita *aŭtisto* anstataŭ *ŝoforo*. Ambaŭ ekzemploj estas konstruitaj el la propra vorttrezoro de esperanto kaj donas koheron al la sistemo de la lingvo. *taŭro* ja estas la normala sekvo de evoluo en nia lingvo: *bovoviro* (slavismo) > *virbovo* > *taŭro*. Oni ne povas nei, ke tiu estas bona vojo de lingva pliriĉiĝo, kiel okazis por *eldoni*, laŭ la samkonsista latine *edere*. Sed *toreadoro* estas oficiala. Restas nenio farota, krom paralele ekuzi alian pli taŭgan formon, kiel ekz. okazis apud la oficiala *proletario*, k. a., ĉe kiu leviĝis kaj fariĝis preskaŭ ekskluziva — kaj ĉiuokaze preferinda — *proleto*, k. t. p., pli taŭgaj kaj pli konformaj al la genio de nia lingvo. Ŝajne tiuj kaj multaj aliaj malkongruaĵoj ŝuldiĝas al la t. n. franca periodo, kiu tre influis nian lingvon⁹⁾. Hispana traduko de verko, kies ĉefaj rolantoj estas taŭristoj,

⁸⁾ K. KALOCSAY 1933, Infero Dekdua kanto, 22—25, p. 105:

Kiel la *taŭro* ŝiras sin elĉene
post morta bato, sed forkuri plu ĝi
ne povas, nur saltadas duonsvene,
tiel komencis Minotaŭro muĝi.

⁹⁾ Almenaŭ por la hispana, tio estas evidenta. En la »Nouveau petit Larousse illustré« troviĝas (mi tradukas): »*toréador* (hispana vorto). Nomo, kiun oni donas en Francio al la batalantoj en la hispanaj bovaj kurludoj. (La vera hispana termino estas *torero*).«

ne multe helpis al la solvo de la taŭroludista terminaro, nek al la senbalastigo de esperanto disde tiuj mumiaj fremdismoj. SALAS BONAL, en sia traduko de *Sango kaj sablo* [devus esti *Sango kaj areno*, laŭ la hispana *Sangre y arena*], estis devigata uzi la vorton *taŭro*, kiun li klarigas »ludbatala virbovo«. Sed ĉar paralele li uzis ĉiam *toreadoro* por *taŭristo*, li devis nekonsekvence skribi *taŭra cirko*, *taŭrfesto*, *taŭremulo*, *taŭremularo*, ktp, kio hibridigis la terminologion kaj, pro ne funda kono de la problemo — kaj sekve ties kuraĝa solvo —, provizis nian literaturon per konfuzigaj netaŭgaĵoj esprimaj.

ĉ) *toreadoro*. Homo, kiu luktas kontraŭ virbovoj en hispanaj kaj latinamerikaj bov-mortigaj kurludoj. (Eble estus preferinde, anstataŭ *toreadoro*, ekuzi *taŭr(lud)isto*, pli logikan kaj konforman al la spirito de esperanto kaj al la origina hispana termino.) [El la hispana *toreador*, tra la franca *toréador*, ambaŭ samsignifaj kaj identaj al la esperanta.]

Résumé

Néologismes d'origine espagnole en Espéranto

L'auteur expose la difficulté d'écrire sur l'étymologie des mots en Espéranto faute de tradition et de bibliographie. Il donne quelques normes que, selon son opinion, on pourrait suivre en considérant l'histoire des mots espérantistes. En passant, il fait ressortir le manque de connaissance de la langue espagnole qui existe, en général, dans le champ espérantiste, ce qui a produit des interprétations tordues dans les néologismes que l'Espéranto a pris de l'espagnol.

A continuation il étudie, selon les principes qu'il établit, six mots d'origine espagnole employés en Espéranto: 1. *eldorado* (<*El Dorado*), avec les événements de l'histoire d'Amérique qui produisirent ce mot; 2. *donĵuano* (<*Don Juan*), que l'auteur propose, en conformité avec le principe du phonétisme étymologique, au lieu des formes vacillantes et par plus internationales *donjuano*, *Don Juano*; 3. *donkikoto* (<*Don Quijote*), qu'il justifie comme la plus propre en égard aux différentes graphies et prononciations internationales; 4. *gerilo* (<*guerrilla*), qu'il préfère sans *v* (*gverilo*) à cause de la prononciation plus facile et parce que le *v* ne se justifie pas phonétiquement; 5. *kaŭdilo* (<*caudillo*), qu'il juge inutile, quoiqu'il partage le principe de transcrire la *ll* espagnole par *l* en Espéranto, principe qu'il discute et débat avec de nombreux exemples; 6. *torea-*

doro (<*toreador*), mot officiel, que l'auteur considère maladroit, et à côté duquel il propose l'emploi du néologisme *taŭristo* < *taŭr(lud)-isto*, qu'il justifie morphologiquement avec le parallèle lat. *edere* = Esp. *eldoni* et qui serait semblable à *aŭtisto* préférable à *ŝoforo*.

BIBLIOGRAFIO

Ĝenerala

(Fontoj uzitaj, sed ne cititaj)

Vortaroj

GROSJEAN MAUPIN & al.: Plena vortaro de Esperanto, 2a eld.
 FIGUEIREDO, CÂNDIDO DE: Novo dicionário da língua portuguesa.
 PETROCCHI, P.: Novo dizionario scolastico della lingua italiana.
 Real Academia Española: Diccionario de la lengua española.
 WÜSTER, EUGEN: Enciklopedia vortaro esperanta-germana
 The Concise Oxford Dictionary of Current English.
 Nouveau petit Larousse illustré.

Gramatikoj kaj aliaj

Jos, E., 1927: La expedición de Ursúa al Dorado y la rebelión de Lope de Aguirre. Huesca (Hisp.).
 KALOCSAY, K. & G. WARINGHIEN, 1932: Kiel fariĝi poeto aŭ parnasa gvidlibro. Budapest.
 — — 1938: Plena Gramatiko de Esperanto, 2a eld. Budapest.
 MENÉNDEZ PIDAL, R., 1941: Manual da gramática histórica española, 6a eld. Madrid.
 NAVARRO TOMÁS, T., 1932: Manual de pronunciación española, 4a eld. Madrid.
 NEERGAARD, PAUL, 1933: Fremdvortoj en Esperanto. Paris.

Speciala

Rim.: Kiam temas pri tradukoj, mi citas ĉiam laŭ la nomo de la tradukinto, ĉar nur tiu respondecas pri la esperanta lingvaĵo.
 BAGHY, JULIO, 1933: Verdaj donkiĥotoj. Budapest.
 DEGENKAMP, G. J., [1939]: Jef Last, La hispana tragedio. Paris.
 ENGHOLM, STELLAN, 1944: — Malgranda Revuo 2 (n-ro 3): 24.
 HOHLOV, N., 1928: La tajdo. Horrem bei Köln.
 INGLADA ORS, V., 1934—1935: — Nia Vivo 4—5 (n-roj 46, 47, 48).
 KALOCSAY, K., 1933: Dante, Infero. Budapest.
 — 1934: Benito Mussolino, Vivo de Arnaldo, enkonduka poemo. Budapest.
 — 1948: La balado de Franco. — Internacia Kulturo 3 (n-ro 1—2): 13.

- LANTI, E., 1940: *Leteroj de E. Lanti*. Paris.
- LEJZEROVICZ, I., 1933: *Salom Asch, La sorĉistino el Kastilio*. Budapest.
- NEERGAARD, PAUL, 1942: *La esperantologio kaj ties disciplinoj*. — [libro] *Tra densa mallumo*: 37—64. Kopenhago.
- RÉGULO PÉREZ, J., 1944: — *Malgranda Revuo* 2 (n-ro 3): 24—27.
- ROSSETTI, RETO, 1948: *Profesoro Klapelklap vizitas la Malmö-kongreson*. — *Lit. Mondo*, 3a periodo, 2: 131—133.
- SALLAS BONAL, R. DE, 1935: *Vicente Blasco Ibáñez, Sango kaj sablo*. Zaragoza.
- STOJAN, PETRO, 1948: *Deveno kaj vivo de la lingvo esperanto*. — *Flandra Esp.* n-ro 170/171: 3.
- TOTSCHÉ, LUDOVIKO, 1932: *De paĝo al paĝo*. Budapest.
- VERDANO, 1948: *Pri derivaĵoj*. — *The Brit. Esp.* 36: 149—150.
- WARINGHIEN, G., 1948: *Leteroj de L.-L. Zamenhof. I. 1901—1906*. Paris.
- La Praktiko* 12: 106—107, 1948.
- La Progresanto* 8: 15, 1946.
- Lit. Mondo*, 3a periodo, 2: 158, 1948.

Bibliografio de esperantologia literaturo 1940-1948

de D-ro PAUL NEERGAARD

I

Kiel menciite en la Enkonduko ni intencas en tiu ĉi revuo aperigi referatojn kaj recenzojn pri publikigaĵoj, kiuj havas rilaton al esperantologiaj temoj. Laŭeble ni ankaŭ volas publikigi bibliografiajn listojn pri ĉiuj verkaĵoj, ĉu gazetaj artikoloj, ĉu libroj, kiuj pritraktas Esperanto-lingvistikajn problemojn. La jena bibliografio servas kiel enkonduko al tiuj ĉi klopodoj. Ĉar la amplekso de la esperantologia literaturo aperinta dum la milito ne estas tre abunda, estas nun oportune per pritrakto de tiu relative literaturmaliĉa epoko komenci la bibliografian registradon.

La bibliografio estas aranĝata laŭ la internacia decimala klasifiko, DK (vidu artikolon pri tiu temo en Scienca Revuo 1: 8—17, 1949), same kiel estos la publikigota rubriko de la revuo. Ni prokrastos la ekpublikigon de tiu ĉi rubriko ĝis post la finpublikigo de la jena enkonduka laboraĵo.

Mi celis inkludi en la sinoptikon ĉiujn »lingvajn studojn« pri Esperanto, kiuj prezentas — el ne tro severa vidpunkto — rezulton de memstaraj esploroj aŭ observoj koncerne al la lingvo, aŭ kiuj donas konsiderojn, vidpunktojn ne tro banalajn. Verkaĵoj, kiuj nur havas valoron por pli malpli elementa instruado de la lingvo, ne estas inkluditaj. Ĉar originalaj konsideroj ofte troviĝas en malgrandaj notoj, ankaŭ tiaj estas inkluditaj. Ankaŭ en recenzoj multfoje estas troveblaj rimarkindaj konsideroj, sed por limigi la amplekson mi el recenzoj nur kunprenis nemultajn el la plej gravaj.

Eĉ interne de siaj limoj la bibliografio, kies unua parto ĉi-sube sekvas, ne estas kompleta, ĉar ne estis je mia dispono ĉiuj eldonaĵoj ĉi-koncernaj, precipe ne ĉiuj gazetoj enhavantaj artikolojn ĉi tie priatentindajn. Por ebligi kiel eble plej kompletan

sinoptikon mi petas al redaktoroj, eldonistoj kaj aŭtoroj, ke ili bonvolu sendi al mi materialon prikonsiderindan por la pritraktata 9-jara epoko, kaj ankaŭ ke ili estonte regule sendu al mi siajn eldonaĵojn.

Ekspliko de signo:

E = 408.92 »Esperanto«.

E—093.2. Lingvoformoj de generacioj kaj de aĝo- stupoj, Ontogeneza lingvoevoluo

FISHER, CONRAD: Dodododat! Ĉu nova »Ido«-lingvoprojekto? [pri infanlingvo]. — Am. Esp. 59: (n-ro 5—6): 48, 1944.

WEIDE, AUGUST: Niaj karaj infanetoj [pri infanlingvo]. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1070): 2, 1947.

E—1. Ortografio

BANHAM, F. R.: [Pri batalpometoj ĥ, kz]. — Svenska Esp. Tidn. 34 (n-ro 7—8): 69, 1946.

BIGO & TEODOR JULIN: Pri apostrofo. — Svenska Esp.-Tidn. 34 (n-ro 11): 108, 1946.

BLUETT, J. L. C.: regulo pri ks kaj kz. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1073): 4, 1947.

[BUTLER, M. C.]: Notes on the Esperanto alphabet [grafismo kaj fonetismo]. — Brit. Esp. 35. (n-ro 481—482): 42—44, 1945.

CARREIRO NETO, PORTO: La literoj Q, W, X, Y. — Heroldo de Esp. 22 (n-ro 1050): 8, 1946.

DIEUSAERT [probabla preseraro: DIEUSRERT], GASTON: Esperanto kaj alfabeto »Morse«. — Int. Kulturo 3 (n-ro 11—12): 27, 1948.

DRATWER, I.: [noto] Pri transskribo de rusaj nomoj. — Lit. Mondo 1. periodo, 1 (n-ro 11—12): 187, 1947.

GERDMAN, BIRGER: La litero X. — Svenska Esp. Tidn. 29 (n-ro 2): 31, 1941.

JULIN, TEODOR: Pri apostrofo. — Svenska Esp.-Tidn. 34 (n-ro 12): 118, 1946.

[JUNG, TEO]: La literoj Q, W, X, Y. — Heroldo de Esp. 22 (n-ro 1052): 4, 1946.

— : La supersignoj. — Heroldo de Esp. 24 (n-ro 1086): 2, 1948.

— : Denove la supersignoj. Ĉu vere ni ne povus sincere pritrakti niajn problemojn? — Heroldo de Esp. 24 (n-ro 1095): 2, 1948.

KALOCSAY, K.: Demeti la ĉapelon. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 5—6): 92, 1948.

- KLEIN, M.: Regulo pri ks kaj kz. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1062): 4, 1947.
- KUBACKI, JOHN: Esperanto simpligita [pri enkonduko de sensupersignaj literoj], 4 p., 1947 (x) — Aldonaĵo al Esperanto simpligita, 2 p. (x) — Dua aldonaĵo al »Esperanto simpligita«, 4 p. (x) — Al la estimatay membroy de la »Lingva Komitato« . . . , 1 p. — Simpligita Esperanto Klubo, 1 p. — Alvoko al ĝiu pripensantaj esperantistoy, 4 p. (x) — Resumo de kialoy por la forigo de la supersignitay literoy el la Esperanta alfabeto, 4 p. 1948 (x) [la publikigaĵoj markitaj per (x) havas tekston paralele en Esp-o kaj angla lingvo].
- LIENHARDT, ALBERT: Ĉu la problemo pri racionala skribmaniero de Esperanto estas solvebla? 7 p., Mulhouse 1948. [ciklostilita].
- MAGNÚSSON, ÓLAFUR S.: [pri sensupersignaj literoj]. 8 p., Reykjavik 1948. [ciklostilita].
- RICHARDSON, A.: Pri la supersignitaj literoj. — Kompreni 2 (n-ro 15): 6, 1947 [represo el The British Esperantist 1908].
- RULOFIDO, PETRO: »Simpligita Esperanto«. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 5—6): 91—92, 1948.
- SALEX: »Batalpometoj«. [pri kz, ĥ, supersignoj, landnomoj k. a.] — Svenska Esp.-Tidn. 34 (n-ro 1): 5, 1946.
- : Batalpometoj II [apostrofo, -ĉj-] — Svenska Esp.-Tidn. 34 (n-ro 6): 51, 1946.
- SCHOONENBERG, H.: Ankoraŭ pri supersignitaj literoj. — Esp. 41 (n-ro 515): 108, 1948.
- SETÄLÄ, VILHO: La batalpometoj. — Svenska Esp.-Tidn. 34 (n-ro 3): 31, 1946.
- VILBORG, EBBE: Por ĥ. — Svenska Esp.-Tidn. 34 (nr-o 2): 11, 1946.

E—2. Parolpartoj (partes orationis)

E-24. Pronomoj

- SETÄLÄ, VILHO: Ni. — Heroldo de Esp. 22 (n-ro 1058): 4, 1946.

E-26. Numeraloj

- OSSAKA, KENĜI: Numeraloj kaj nombrovortoj. 45 p., Osaka Esperanto-Biblioteko 1948.

E-27. Adverboj

- ENGHOLM, S.: Ankaŭ — anke. — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 5): 38, 1944.

E-282. Prepozicioj

- BAILEY, WILLIAM: Pri neordinara uzado de »ĝis«. — Brit. Esp. 33 (n-ro 333—334): 42, 1941.

- BAILEY, WILLIAM: Pri la vorto »po«. — Brit. Esp. 33 (n-ro 431—432): 29—30, 1941.
- : Pri la prepozicio »da«. — Brit. Esp. 33 (n-ro 435—436): 58, 1941.
- BUTLER, MONTAGU C.: Pri la prepozicio »po«. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1073): 4, 1947.
- KALOCSAY, K.: La problemo de »po«. — Lit. Mondo 3. periodo, 1 (n-ro 7—8): 122—124, 1947.
- : La solvo de »po«. [respondo al R. ROSSETTI] — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 1—2): 27—28, 1948.
- : La definitiva fino pri »po«. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 3—4): 59, 1948.
- ROSSETTI, R.: La solvo de »po«. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 1—2): 26, 1948.
- RULOFIDO, PETRO: Pri »po«. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1067): 4, 1947.

E-283. 2. Interjekcioj

- AZORIN, FRANCISKO: Pri la interjekcio. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1060): 4, 1947.
- OSSAKA, KENĴI: Esperantaj interjekcioj kaj onomatopeoj. Osaka Esp.-Biblioteko 1948. 2 + 48 p.

E—3. Leksikologio

E-311. Geografiaj nomoj

- BUCHET, M.: Respondo al s-ro Lucien Thevenin io-ujo. — Kompreni 3 (n-ro 22): 7, 1948.
- BUTLER, (M. C.): Io-ujo. — Lit. Mondo 3. periodo, 1 (n-ro 3—4): 59, 1947.
- : Ĉu la landnomoj devas finiĝi per ujo aŭ io? — Kompreni 3 (n-ro 21): 7, 1948.
- CARION, DANIEL: Pri la Babela -ujo kaj -io. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 3—4): 60, 1948.
- ENGHOLM, S.: Finnlando — Suomujo. — Svenska Esp. Tidn. 32 (n-ro 5): 38, 1944.
- I. E.: »Suomo« aŭ finno. — Svenska Esp. Tidn. 32 (n-ro 10): 72, 1944.
- IHAMÄKI, LAURI: Finnlando — Suomujo. — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 6): 47, 1944.
- JOHANSSON, ALBIN: Respondo al G. A. Nygård (io-ujo). — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 2): 11, 1944.

NOTOJ

Universitataj katedroj de Esperanto

Ĉi-sube estas donitaj informoj (kolektitaj surbaze de demando) pri ĉiuj de ni konataj katedroj de Esperanto ĉe universitatoj kaj ĉe aliaj kiel samrangaj konsiderataj altlernejoj. Ne inkluditaj estas popolaj altlernejoj. Kiel *aldono* al la sinoptiko estas menciataj kelkaj universitatoj kaj altlernejoj, en kiuj oni ekster la katedroj instruas Esperanton. — Kompletigaj informoj estas dezirataj kaj de tempo al tempo publikigataj en ĉi tiu rubriko.

PAUL NEERGAARD.

Aŭstrujo

Universitato Innsbruck (Universität Innsbruck). *Fondo de la katedro*: laŭ decido de la profesorado (22. 1. 1947, n-ro 539, filoz. fakult.), aprobita de la instru-min. la 17. 7. 1948, n-ro 34.386-III/8-48. *Fakultata aparteno*: filozofia fakult. *Programo*: tri lecionojn (2 + 1) po semajno. En la vintra semestro 1948—49: 1. Enkonduko en la lingvon E., 2. Enkonduko en la historion kaj movadon de E. *Lektoro*: d-ro LEO BLAAS.

Altlernejo por Agrikulturo, Wien (Hochschule für Bodenkultur). *Fondo de la katedro*: 1. 8. 1946, dekreta n-ro 45.550/46. *Programo*: instruado, parte en formo de kolokvioj, por komencantoj kaj

por progresintoj. *Lektoro*: profesoro, d-ro E. J. GÖRLICH.

Altlernejo por Internacia Komercio, Wien. (Hochschule für Internationaler Welthandel). *Fondo de la katedro*: ministeria dekreto n-ro 9.281/47 kaj (denove) n-ro 76.749/7/48 (20. 8. 1948). *Lektoro*: instruisto JOSEF GEISSLER.

Teknika Altlernejo, Wien (Technische Hochschule). *Fondo de la katedro*: ministeria dekreto de 25. 2. 1917, n-ro 4508 laŭ propono de la profesorado. *Lektoroj*: 1917—1930: direktoro JOSEF SCHAMANER, 1930—19???: kortega konsilanto d-ro FRANZ WOLLMANN, lerneja inspektoro kaj direktoro de la Ŝtata Komisiono pri ekzamenoj en E. Nuna lektoro (post la dua mondmilito): profesoro, d-ro HUGO SIRK.

Britujo

Universitato de Liverpool (University of Liverpool). *Fondo de la katedro*: per fondaĵo testamentita de d-ro JOHN BUCHANAN al la universitato por tiu celo. Akceptita de la universitata estraro la lektorato estis fondita en 1931 kun aprobo de la fakultato de filozofio kaj la Senato de l' Universitato. *Fakultata aparteno*: Filozofia fakult. *Programo*: Kurso por komencantoj, kaj kurso por progresintoj, en kiu lasta oni plue ekzercas praktikan kaj teorian

scion de E. kaj pritraktas interlingvistikajn problemojn. *Rajtigo*: E. estas ne-ekzamena unua-jara temo en la kursaro kondukanta al la grado de Bachelor of Arts (B. A.) kaj rekonita kiel tia de la fakultato. *Lektoro* (John Buchanan Lecturer in E.): depost la fondiĝo de la lektorato profesoro, d-ro W. E. COLLINSON. *Aldona informo*: La fondaĵo ankaŭ ebligas ĉiujaran disdonon de tri premioj (ĉiu: 25 anglajn funtojn).

Ĉeĥoslovakujo

Ĉeĥa Teknika Altlernejo en Praha (České vysoké učení technické v Praze). *Fondo de la katedro*: per decido de la profesoraro 4. 10. 1922, n-ro 544, aprobita de la instrumministro 13. 12. 1922, n-ro 115.445. Tenata per publikaj ŝtataj financoj. *Fakultata aparteno*: fakultato VI, fakultato («altlernejo») por specialaj sciencoj (Vysoká škola speciálních nauk). *Programo*: Gramatiko de E., ekzercoj, evoluo de E. 1887—1947, prelegoj pri la historio de la ideo pri la universala lingvo, E.-literaturo kaj historio de la E.-movado. *Rajtigo*: disdono de atestoj, post ekzameno, konfirmataj de la lektoro kaj la fakultata dekano, kiu ĉeestas la ekzamenon. *Lektoro*: d-ro fil. AUGUSTIN PÍTLÍK, 1922—1939, depost 1945 (dum la milito la lektorato estis fermita).

Germanujo

Johannes - Gutenberg - Universitato Mainz a. Rh. (Johannes-Gutenberg-Universität Mainz a. Rh.). *Fondo*

de la katedro: akceptita ekde la vintrosemestro 1947—48 (detaloj mankas) kaj tenata per financoj de la Universitato. *Fakultata aparteno*: Filozofia fakultato. *Programo*: Enkonduko kaj instrukursoj en E., semajne du horojn. *Rajtigo*: la partoprenon oni atestas en la studlibro. *Lektoro* (Lehrbeauftragter): Handelschullehrer JOHANNES FLATTEERS.

Ludoviko-Maksimiliano-Universitato München (Ludwig-Maximilians-Universität München). *Fondo de la katedro*: 23. 1. 1947 per dekreto de la Bavara Ŝtata Ministerio por Instruado kaj Kulto, n-ro U 12 Olz./5b/91a (du horojn semajne), 26.8.1947 plivastigita per dekreto de la sama instanco, n-ro V 37203 (kvar horojn semajne). Tenata per publikaj financoj. *Fakultata aparteno*: filozofia fakult. *Programo*: du horojn semajne por komencantoj, du horojn por progresintoj (kolokvioj nur en E.). *Rajtigo*: Disdono de ekzamenaj diplomoj, kiujn subskribas la lektoro kaj la rektoro de la universitato. *Lektoro* (Lehrbeauftragter): d-ro fil. SIEGFRIED ZIEGLER. *Aldona informo*: La Germana E.-Instituto, München (sola E.-instituto de Germana E.-Asocio) fariĝos laŭ promeso de la Bavara Kultministerio oficiala Instituto de la Universitato München. Intertempe la Bavara registaro disponigis al ĝi 10.000 RM, kaj nova subvencio estas atendata.

Teknika Altlernejo, München (Technische Hochschule München).

Fondo de la katedro: 13. 11. 1947 per dekreto de la Bavara Stata Ministerio por Instruado kaj Kulto, n-ro III 53309. Tenata per publikaj financoj. *Fakultata aparteno:* fakultato por ĝeneralaj sciencoj. *Programo:* du horojn semajne por komencantoj. *Rajtigo:* disdono de diplomaj atestoj. *Lektoro* (Lehrbeauftragter): d-ro fil. SIEGFRIED ZIEGLER.

Justus - Liebig - Altlernejo Giessen (Justus-Liebig-Hochschule Gießen). Detaloj mankas. *Lektoro:* profesoro, d-ro REINHARD STRECKER.

Hungarujo¹⁾

Universitato de Szeged (Szegedi Tudományegyetem). *Fondo de la katedro:* per decido de la profesoro 24. 1. 1947, n-ro 214/1946—47 bksz., aprobita de universitata magistrato 27. 6. 1947, n-ro 1388 kaj aprobita de Hungara Religia kaj Instrua Ministerio 15. 7. 1947, n-ro 96641/VI ü. o. *Fakultata aparteno:* filozofia, lingvo- kaj historio-scienc-fakult. *Programo:* kvar horojn semajne instruado por komencantoj. *Rajtigo:* disdono de atestoj post ekzameno je fino de ĉiu semestro sesmonata. La atestoj estas konfirmataj de la lektoro kaj la fakultata dekanato en la studlibreto de la studento. *Lektoro* (lektor): ERNESTO J. FARKAS.

¹⁾ Informo pri starigo de lektorato ĉe la Universitato de Pécs (Hungarujo) en Informilo n-ro 4 (julio/aŭgusto 1946) de Esperanto-Grupo »Laboro«, München, ne povis esti konfirmata.

Pollando

Jagiellona Universitato, Kraków (Uniwersytet Jagiellonski Kraków). *Fondo de la katedro:* 14. 10. 1930, post la milito 18. 10. 1946 L. 94/46 per decido de la konsilantaro de la Humanisma Fakultato kaj starigita per financa helpo de Ministerio de Klerigo. *Fakultata aparteno:* humanisma fakult. *Programo:* instruado de la lingvo en elementa kaj supera grado, ne prelegoj. *Rajtigo:* Disdono de atestoj post ekzameno, kiujn subskribas la lektoro kaj la fakultata dekanato. *Lektoroj:* en 1930—31: Mgr. TADEUSZ HODAKOWSKI, depost 1946: profesoro MIECZYSLAW SYGNARSKI.

Universitato de Lodz (Uniwersytet Łódzki). *Fondo de la katedro:* per decido de la profesoro en 1946 (detaloj ne sciigitaj). Tenata per financoj de la Pola Ministerio de Klerigo. *Fakultata aparteno:* humanisma fakult. *Programo:* konciza pritrakto de la historio de Esp-o, krome gramatiko, ekzercado skriba kaj buŝa, konversacio. *Rajtigo:* Ekzamenoj ne estas ankoraŭ enkondukitaj, la lingvo estas laŭvole lernata. *Lektoro:* L. TEMERSON.

Aldono. Universitataj Esp-o-kursoj ekster la katedroj

En pluraj universitatoj kaj samrangaj altlernejoj oni instruas Esperanton, en kelkaj laŭ la indikoj »oficiale«, per kursoj ekster la katedroj. Informoj estas ricevita pri la jenaj: *Slovaka Komerca Altlernejo*, Bratislava (laŭ Heroldo de E., n-ro 1053,

1946). *Universitato de La Laguna*, Tenerifo, Kanariaj Insuloj (i. a. laŭ Esperanto Int. 11, n-ro 4: 51, 1947, Esperanto n-ro 502: 115, 1947, Esperanto n-ro 513/514: 91, 1948), *Teknika Altlernejo en Forlì*, Italujo (ĉu temas pri altlernejo samranga al universitato?) enkondukis E. kiel devigan fakon (katedro?) (laŭ Ponto 1, n-ro 3/4: 17, 1947), *Universitato de Habano*, Kubo (laŭ Ponto 2, n-ro 9/10: 54, 1948), *Universitato de Ĉilio*, Santiago, Ĉilio (prospekto pri someraj kursoj ricevita), *Universitato de Toronto*, Kanado (laŭ Ponto 2, n-ro 9/10: 54, 1948), *Universitato de Varna*, Bulgarujo, kie estis kursgvidanto dum 1948 s-ro GEORGI DIMOV (informo de d-ro S. ZIEGLER), *Rollins College*, Winter Park, Florida, Usono (Am. Esperantist 63b,

n-ro 3: 2, 1948), *The Southwest United Universities of Kunming*, Ĉinujo (laŭ Am. Esperantist 69, n-ro 7/8: 82, 1945), *Komerca Universitato de Osaka kaj Ekonomia Kolegio de Osaka*, Japanujo (laŭ raporto de IKEGAWA en Esperanto n-ro 508: 21, 1948), *Kolegio de Lingvoj de Osaka* (persona informo de prof. KAWASAKI). *Zikeikai Medicina Universitato, Tokio*, enkondukis E. kiel la trian fremdlingvon en »oficiala kurso« kun 300 studentoj (Esperanto Int. 10, n-ro 12: 179, 1946), *Egipta Universitato* (medicina fakultato) en *Kairo*, *Komerca Altlernejo, Kairo*, kaj la *Ameriko-Universitato en Egiptujo* (laŭ Ponto 3, n-ro 1/2: 7, 1949). *University of Washington*, Seattle, Wash. (laŭ Am. Esp. Mag. 63, n-ro 1—2: 31, 1949).

La vinjeto sur la kovrilo estis desegnata kun signoj el la »pazigrafio«, publikigita de DE MAIMIEUX en Parizo 1797 (vidu E. DREZEN: Historio de la mondolingvo, Leipzig 1931, p. 55—58), kiel modelo.

La vinjeto estis alfarata por sia destino de ornamo surbaze de la vorto »pazigrafio« (t.



e. universala skribo) skribita per la signoj de la pazigrafio

de DE MAIMIEUX.

Cetere la vorto »pazigrafio«, kiu estas nun uzata por ĉiaj sistemoj de »skribaj mondlingvoj«, estis proponata de DE MAIMIEUX.

Landnomoj. Post konsiliĝo inter la membroj de la redakta komitato oni, malgraŭ forta inklino ĉe ties granda plimulto al la *io*-formoj, decidis en la redakciaj partoj de la revuo uzi la oficialajn *ujo*-formojn. Aliflanke, oni decidis lasi al la kunlaborantoj plenan liberecon uzi en siaj kontribuadoj la *io*-formojn, se ili tion preferas.

Inter manuskriptoj publikigotaj en la venontaj kajeroj estas ampleksa statistiko de 50.000 tekstvortoj de Esperanto, de lektoro, d-ro LEO BLAAS, Univ. de Innsbruck, kaj studo pri transskribo de japanaj vortoj en Esperanton, de prof. NAOKAZU KAWASAKI, Lingva Kolegio de Osaka, Japanujo.

- 4) Ni rekomendas, ke traktaĵo estu dividata en sekciojn, ĉiu provizata per titolo. Klareco kaj koncizo estas esencaj.
- 5) Bibliografiajn referencojn indiku per la nomo de la aŭtoro sekvata per la jaro: (MOCH 1907) aŭ MOCH (1907). La bibliografion oni metu en la fino de la artikolo aranĝatan alfabete kaj kun ĉiu indiko redaktata jene:
MOCH, GASTON, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.
- 6) Ni presigas ĉiujn ekzemplojn pri vortformoj *kursive*, kaj tiajn ekzemplojn oni bonvolu substreki en la manuskripto (ne substreku ion alian). Se la aŭtoro deziras emfazi nemultajn gravajn vortojn aŭ frazojn koncizajn, oni substreku tiujn ĉi per rompita linio, kaj ili estos presataj interspacigite. Ĉiuj personaj nomoj estas presataj per malgrandaj ĉefliteroj: MOCH, kaj povas esti tajpataj tute per ĉefliteroj: MOCH.
- 7) Oni finu la artikolon per konciza kaj klara resumo redonanta la plej gravajn punktojn de la teksto.
- 8) La aŭtoro ricevas du presprovaĵojn de sia artikolo. Korektoelspezoj, kiuj superas 10 % de la kosto de la kompostado, devas esti pagataj de la aŭtoro.
- 9) La redaktoro bedaŭras ne povi honorarii artikolojn akceptitajn.
- 10) *Represaĵoj*. Ĉiu kontribuinto ricevas 2 ekzemplerojn de la kajero enhavanta lian artikolon. Senkostaĵaj represaĵoj ne estas je dispono. Tarifo estas ĉemetata al la presprovaĵo kaj la aŭtoroj povas mendi represaĵojn plenigante kaj resendante ordonan formularon.

- 4) It is recommended that papers be divided into sections, each headed by a caption. Clearness and conciseness are essential.
- 5) Text references should be made using author's name followed by the year: (MOCH 1907) or MOCH (1907). The bibliography should be placed at the end of the article and arranged in alphabetical order. Each item should be redacted as follows:
MOCH, GASTON, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.
- 6) We print all examples of word-forms with *italics*, and such examples should be underlined in the manuscript (do not underline anything else). If the author wants to emphasize a few important words or short sentences these should be underlined with a broken line and will be printed with spaced type. All personal names are printed with small capitals: MOCH, and may be typed entirely with capitals: MOCH.
- 7) The article should conclude with a short, clear summary reviewing the important points in the text.
- 8) The author receives two proofs of his article. Correction costs which exceed 10 % of the type-setting costs must be paid by the author.
- 9) The editor regrets not to be able to pay any fee for articles submitted.
- 10) *Offprints*. Each contributor will receive 2 copies of the issue in which his article is published. No gratis offprints will be supplied. A printed schedule of prices is submitted with the proof and authors may secure offprints by placing an order on the blanks provided when proof is returned.

Landaj perantoj

(Baza kotizo por unu volumo 250—300-paĝa: 5 usonaj dolaroj. La kotizo estas en aliaj valutoj indikita kun rezervo rilate kursŝanĝojn.)

BELGUJO (225 belgaj fr.): Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brussel W.

BRAZILO (100 kruz.): S-ro Jozefo Joels, Caixa Postal 2-Lapa, Rio de Janeiro.

BRITUJO (24 sh.): S-ino M. C. Major, Flat 5, no. 15 Powis Square, London W. 11.

BULGARUJO (900 levoj): Internacia Kulturo, Str. Tri Uŝi 15, Sofio.

ĈEĤOSLOVAKUJO (250 ĉeĥ. kr.): Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, Praha XIX, Uralské Nám. 9. *Poŝtparkasa konto: 12.371.*

DANLANDO (23 d. kr.): Esperantologio, d-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, København K. *Postkonto: 2661.*

FINNLANDO (700 f. mk.): Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki-Kä. *Postkonto: 6564.*

FRANCUJO kun kolonioj (1200 fr. fr.): Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris 20.

GERMANUJO (15 germ. mk.): Germana Esperanto-Instituto, Engelbertstr. 7, München-Pasing. *Postĉekkonto: Bayerische Hypotheken- und Wechselbank, Zweigstelle Pasing, Postscheckkonto 636, München, für Konto Esperanto-Institut Nr. 7603.*

HUNGARUJO (60 forintoj): Literatura Mondo, Budapest VIII, Röck Szilard-str. 28. *Postĉekkonto: Budapest 4014.*

ITALUJO (3400 liroj): Esperanto-propaganda Centro c/o Società I. T. I. Lombarda, via Foscolo 3, Milano.

JAPANUJO: Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomachi I-13, Tokio. *Postgirkonto: Tokio 11.325.*

NEDERLANDO (13 guldenoj): S-ro C. van Essen, Floretstraat 10, Rotterdam Z. *Postkonto: 86.033.*

NORVEGUJO (23 norv. kr.): S-ro Nils Utne, Norges tekniske høgskole, Trondheim. *Postgirokonto: 784.98.*

POLLANDO (2.000 zł.): Asocio de esperantistoj en Pollando, ul. Marszałkowska 81/32, Warszawa, *Konto P. K. O.: Warszawa I-3429.*

PORTUGALUJO (1200 fr. fr.): Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris 20.

SVEDUJO (18 sv. kr.): S-ro H. Mylén, Sallerupsvägen 26 c², Malmö. *Postkonto 246.993.*

USONO (5 us. dol.): S-ro R. C. Marble, P. O. Box 948, Sherman Oaks, California.

ALIAJ LANDOJ: 50 Steloj de Univ. Ligo estas akceptataj kiel kotizo.